1982 januaro
75-a jaro
n-ro 913 (1)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

Esperanto

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Ovidio, pupoj kaj aktoroj: Kiu flegas nian teatran arton?

Vi trovos,

ke ni intence nenion lernis de tiu "sarkasma kaj entuziasma" brito, kiu antaŭ kelke da jaroj kritikis la movadan orientiĝon al "pupismo" kaj "uneskismo". En ĉi tiu numero de la revuo ni dediĉas elstaran spacon ĝuste al tiuj du temoj, ĉar sur tiuj du kampoj okazas io, kio nomiĝas sukcesoj. Longaj recenza kaj bibliografia rubrikoj ĉi-foje memorigos vin, ke ni ankoraŭ ĉiam estas libra movado. Listigo de ĉiuj ĝisnunaj verkoj el la Serio Oriento-Okcidento konvinkos vin, ke ankaŭ la projektoj, kiuj unuavide ŝajnas tro ambiciaj por niaj fortoj, feliĉe ne superas ilin kaj estas efektivigeblaj. Ĉu ni povus tiel persisti en la kunlaboro ankaŭ pri aliaj movadaj iniciatoj, kiel ni tion faras en la kazo de ĉi tiu prestiĝa libroserio? Ne respondu skribe! Respondu age tra 1982. Ni certe rimarkos tion. Kvazaŭ pardonpeto por la fino: Komplotis kvino da ni en la redaktejo liveri al vi ĉi tiun numeron frue. Noktomezis jam inter la 16a kaj 17a de decembro, kiam ni provas produkti la lastajn revuliniojn. Feliĉe por ili, malfeliĉe por vi, niaj provlegantoj jam profunde dormas. Se vi do trovos ekstrajn preserarojn ĉi-foje – pardonu! Bonan matenon, cetere! Belan 1982! Bonvenon al la legado de la unua numero de nia 75a jarkolekto!

Enhavo

1 Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA: Prosperan kunlaboron en 1982! (Grégoire Maertens)
2 Turismo kaj Esperanto: Kio okazas inter Manilo kaj Meksiko
Eksteraj rilatoj: Pordoj larĝe malfermitaj
3 Savas la telefono
4 Pupteatro: Ovidio en Velika Gorica (Spomenka Štimec)
5 Seminario pri planado: Valora konatiĝo kun diferencoj (A. Brennan)
6 Nova ĉefverko en la Serio Oriento-Okcidento: Camões kaj lia epopeo pri portugaloj – "luzidoj" (Pierre Ullman)
Librokolekto kiu jubileas: Serio Oriento-Okcidento
9 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 67a Universala Kongreso)
10 Recenzoj: "La klasika periodo; Tra la parko de la franca poezio III" de Gaston Waringhien (Petar Stefanović); "Baladoj el Asante" de Ko Nimo / A. Goodheir (Rikardo Ŝulco); "La korvo" de E.A. Poe / L.H. Knoedt (Mauro Nervi); "Prologo al Rakontoj de Canterbury" de G. Chaucer / W.B. Johnson (James Cool); "Sociologio, ĝia historio kaj problemoj" de Peter G. Forster (Roberto Lloancy); "Esperanto: La solvo de niaj lingvaj problemoj" de R. kaj V. Eichholz (Bernard Golden); "San Diego vokas" de Alberta Casey (Rob Vetter); "Vojaĝo al Faremido / Kapilario" de F. Karinthy / L. Tárkony kaj A. Szabó (Giulio Cappa); "25 jaroj; Antologio de Belartaj Konkursoj" de W. Auld kaj V. Benczik (Charles R.L. Power); "Malvasta kaĝo" de V. Eroŝenko / M. Miyamoto (Boris Kolker); "La tundro ĝemas" de V. Eroŝenko (W. Krikke)
15 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
16 TEJO-paĝo: 38a Internacia Junulara Kongreso: IJK iras al fama universitata urbo
17 Nekrologoj (E. Apine-Grundsteins, R. Manusu, R. das Neves, H. Rohden, H. Saha, J. Ventura i Freixas)
Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
19 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
20 Anoncetoj

La kovrilo

Jen Ovidio, post du mil jaroj preskaŭ, revenas el ekzilo. Portas lin rumanaj, ne romiaj, aktoroj kaj pupoj. Legu pri tio sur la paĝo 4. Pripensu la kovrilan demandon "Kiu flegas nian teatran arton?" Ŝajnas, ke tion pli skrupule kaj pli kontinue faras la pupistoj ol la tiel nomataj veraj kaj vivaj aktoroj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Telefono**: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). **Fondita** en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,– gld.

Anonctarifo (gld.): 1p. 1000, 1/2p. 530, 1/4p. 290, 1/8p. 170, 1/16p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via delle Cave 82/C, I-00181 Roma, Italio; tel. (06) 78 89 970.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo; tel. (061) 226-8101.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; tel. 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387-8288.

Maandelijks tijdschrift. Verantw. uitg.: G. Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge.

d 7.3/82

Prosperan kunlaboron en 1982!

LA ĜENERALA ASEMBLEO de Unuiĝintaj Nacioj fine de novembro proklamis la jaron 1983 – Internacia Jaro de Komunikado. La Esperanto-movado kiel tuto, kaj UEA specife, pro siaj rilatoj kun la specialigitaj organizaĵoj de UN (Unesko, Ekonomia kaj Socia Konsilio), povas grave kaj tre signife kontribui al tiu agado de la ĉefa monda organizaĵo. Niaj preparoj por la Internacia Jaro de Komunikado devus okazi dum 1982. Nia kontribuo al la Jaro elstarigu la rolon de la Internacia Lingvo Esperanto kiel pontolingvo, kiu ebligas rektan, personan kontakton inter miloj kaj miloj da homoj el ĉiuj anguloj de la terglobo. Ni emfazu, ke tian senperan komunikadon povus ĝui la tuta homaro, se la instruado de Esperanto fariĝus ĝenerala kaj tutmonda. Ni atentigu la mondan organizaĵon – kaj pere de ĝi ankaŭ la tutan mondon –, ke komuna internacia lingvo estas por la tutgloba komunikado almenaŭ same esenca kaj same fundamenta kiel la teknikaj kaj ekonomiaj rimedoj.

Per fundaj preparoj en 1982 por la Internacia Jaro de Komunikado, ni samtempe pretiĝas por la Jubilea Jaro 1987. La Estraro de UEA konscias, ke en la internacia Esperanto-movado mankas adekvataj strukturoj, kiuj ebligus festi la centjaran jubileon de Esperanto tiel, ke ĝi estu samtempe plene malfermita al la ekstermovadaj instancoj kaj personoj, kaj ke ĝi, aliflanke, garantiu poste la kontinuecon de tiuj agadoj, kiuj montriĝos plej efikaj. Mobilizi ĉiujn movadajn fortojn por kunordigita agado mondskala – tio estas malnova kaj ŝatata revo de la Esperanto-parolantoj. Tia ĝenerala mobilizo almenaŭ parte jam okazis en la pasinteco, sed ni nun scias, ke ĝiaj sekvoj kaj rezultoj estis mallong-daŭraj kaj ne-esencaj por la Movado mem. Ankaŭ tiam mankis la adekvataj strukturoj por garantii la kontinuecon.

Aliflanke, ni ne bezonas kalkulilon por konstati, ke la Esperanto-komunumo disponas pri grandega potencialo ĝuste por mondskala agado kun longdaŭra efiko. Neniu alia internacia neregistara organizaĵo disponas pri tia tutmonda reto de kunlaborantoj kian havas nia Movado. Sed niaj strukturoj en la internacia skalo ne **uzas plene tiun potencialon.**

Universala Esperanto-Asocio kaj kelkaj ĝiaj landaj asocioj komencis krei komunajn oficejojn en kiuj ili intime kunlaboras. UEA certe daŭrigos laŭ tiu vojo de la t.n. ekspansio. Provizore, tio estas la sola vojo alirebla per niaj rimedoj. Nia deziro estas, ke tiu vojo multfoje kruciĝu kun la vojoj kaj direktoj de aliaj internaciaj aŭ regionaj movadaj organizaĵoj. Tiel estiĝos komuna cirkvito de kunlaboro kaj apogo al komunaj ideoj kaj interesoj. Tiel, iom post iom, kreiĝos ankaŭ tiu strukturo nun mankanta en la internacia Esperanto-movado.

Ni memoru, tamen, ke strukturoj emas sendependiĝi, perdi kontakton kun la bazo, kiu kreis ilin, ekkonstrui por si mem, finfine. UEA volas preventi tiun danĝeron per la komencita malcentrigo de siaj agado, instancoj, administrado. La graveco, kiun la komitataj komisionoj komencis ludi en la vivo de la Asocio, estas ankaŭ kontribuo al la provoj superi la danĝeron, kiun prezentas strukturoj ekzistantaj por si mem.

En tiu rilato leviĝas la problemo de la informfluado. Ni ofte lastatempe diskutis la principojn de nia informado: desupre aŭ desube. Ni emas preteratenti, ke tiu ĝenerala problemo pri la informfluo ekzistas ankaŭ interne de la Esperanto-movado. Niaj strukturoj ne estas konceptitaj por desuba informado aŭ ni tute ne reagas, se tamen okazas ia informofluo tiudirekta. La bedaŭrinda sekvo estas, ke unuopuloj kaj lokaj grupoj tute ne plu inklinas al nacia aŭ internacia kunlaboro, sed ili tute memstare kaj izole provas plani kaj agadi.

Al ĉio ĉi aldoniĝas la fakto, ke la horizontala dimensio de la komunikado interne de la Movado entute mankas aŭ estas tia, ke oni ne rimarkas ĝin. Ne sufiĉas, ke UEA kaj SAT interŝanĝas salutantojn dum siaj kongresoj. Tiuj kongresaj vizitoj devus havi ankaŭ aliajn konsekvencojn. Ili devus utili por la kunordigo de niaj kultura kaj eduka agadoj. Eĉ kiam komitatano aŭ alia funkciulo ĉeestas private, sen specifa komisio, jarkunvenon aŭ renkontiĝon de alia Esperanto-organizaĵo, ankaŭ tio povus kaj devus havi pozitivajn sekvojn por la informado kaj kunlaboro inter tiu organizaĵo kaj UEA. Ni ĉesu pensi pri tiu absurda timo, ke ĉiu reprezentiĝo de UEA ĉe SAT kaj inverse signifas, ke la unua perdas sian neŭtralecon aŭ la dua fariĝas neŭtrala. Tiu transplantado de iaj ekstermovadaj zorgoj kaj timoj estas tute superflua en la Esperanto-movado. Anstataŭe, ni kunlaboru sur la kampoj kaj pri la ideoj, kiuj estas komunaj al ni ĉiuj. Unu el tiuj multaj komunaj kampoj estas la preparo por konvena kaj kiel eble plej efika prifestado de la Jubilea Jaro 1987, al kiu ni ĉiuj ligas grandajn esperojn pri la plua disvastigo de la Internacia Lingvo.

Prosperan kunlaboron deziras al vi ĉiuj,

Grégoire Maertens

Kio okazas inter Manilo kaj Meksiko

KIAM EKSTERULO rigardas la Esperanto-movadon, tiam ĝi ekŝajnas havi rimarkindajn trajtojn de vasta, malbone funkcianta turisma organizaĵo tutmonda. Cetere, la plimulto de la movadanoj ankaŭ ŝajnas esti en la Esperanto-organizaĵoj pro turismo. Ili lernis iom da lingvo, starigis siajn internaciajn kontaktojn, akiris sian diverslandan amikaron, iras ĉiujare almenaŭ al unu el la tradiciaj movadaj renkontiĝoj, por poste montri en sia loka Esperanto-klubo la lumbildojn kaj pretiĝi por simila entrepreno en la venonta jaro. Tiel tra la jaroj, tiel tra la landoj, almenaŭ en Eŭropo kaj Nord-Ameriko, sed supozeble ankaŭ en Japanio kaj Aŭstralio.

Kial ni diris ĉi-supre, ke tiu formale neekzistanta monda movada turisma organizaĵo al eksterulo ŝajnas malbone funkcianta? Nu, ĉar neesperantistoj estas forte impresitaj per la nombro de la movadanoj, kiuj ĉiujare vojaĝas, per la nombro de movadaj renkontiĝoj, kunvenoj, konferencoj kaj kongresoj, kiuj tra la jaro okazas. Ili konsideras tion grandega turisma potencialo, kiu povus vivteni plurajn profesiajn vojaĝagentejojn.

Neniu eluzas tiun potencialon. Preskaŭ neniu. Venas foje organizitaj grupoj, ekzemple al la Universalaj Kongresoj, sed tio tamen estas nur malgranda procentaĵo de la movadaj vojaĝantoj. De tempo al tempo estiĝas iaj kvazaŭ movadaj vojaĝoficejoj, sed ĝis nun neniu el ili grandskale sukcesis. Estus interese esplori la kaŭzojn de tiuj malsukcesoj. Ĉar, kiam UEA pasintjare aliris diversajn flugkompaniojn por organizi la vojaĝon al la Kongreso en Brazilio, estis nenia problemo gajni iliajn intereson kaj pretecon grave rabati la vojaĝkostojn, kaj presigi tiujn buntajn prospektojn en Esperanto.

EKSTERAJ RILATOJ:

Pordoj larĝe malfermitaj

FINE de novembro, inter la 26a kaj la 28a, okazis en Parizo pluraj renkontiĝoj inter diversaj funkciuloj de Unesko kaj reprezentantoj de UEA. En tiu taĉmento de UEA troviĝis d-ro H. Tonkin kiel estrarano pri eksteraj rilatoj, d-ro Peter Zlatnar kaj mag. T. Sekelj, ambaŭ el Jugoslavio, s-ino Barbara Despiney el Parizo kaj la redaktoro de ĉi tiu revuo.

Hierarkie la plej grava kontakto estis tiu kun s-ro D. Najman, unu el la kvin sektoraj direktoroj de Unesko, respondeca i.a. pri la eksteraj rilatoj de la organizaĵo. Li tuj akceptis la iom reteneme prezentitan ideon organizi specialan konferencon de ekspertoj en la sidejo de Unesko kaj trakti en tiu konferenco la lingvan dimension de la komunikado. Ĝi devus okazi fine de 1982 aŭ komence de 1983. En marto ĉi-jare s-ro Najman volonte rediskutos detalojn pri tiu konferenco.

S-ro Asher Deleon, kiu siatempe estis sekretario de la speciala komisiono pri komunikado (kiun estris S. MacBride), nun gvidas la eldonan fakon de Unesko. Li montris grandan intereson pri planoj de UEA eldoni kelkajn Unesko-librojn en Esperanto. Eblas tiurilate kalkuli ankaŭ pri financa subteno.

Surprizo estis la renkontiĝo kun la konsilisto de la ĉina delegacio ĉe Unesko, s-ro Taŭ Ĝun, kiu montriĝis bone informita pri Esperanto kaj preta subteni niajn iniciatojn. Simile estis ĉe la tunizia ambasadoro, s-ro Mustapha Masmoudi, antaŭe membro de la menciita komisiono pri komunikado. Li estas tiu, kiu aldone al la Raporto de MacBride tre emfaze parolas ĝuste pri la lingvo-problemo. La ambasadoro Masmoudi volonte akceptis la inviton ĉeesti la ĉi-jaran Universalan Kongreson en Antverpeno, pri kio li ankoraŭ konsultos sian registaron, kiel kutime okazas pri tiaj demandoj.

Okazis ankaŭ renkontiĝo kun funkciulo de la nederlanda misio ĉe Unesko, kun reprezentanto de Asociiĝintaj Lernejoj de Unesko kaj kun respondeculo en la sekcio, kiu prizorgas la rilatojn de Unesko kaj la neregistaraj organizaĵoj.

Estis tre utile konstati surloke la pozitivan evoluon kaj la seriozecon, kiun alprenis la rilatoj inter Unesko kaj UEA. Eblis konstati, ke la rilatoj inter la du organizaĵoj efektive estas kunlaboraj, kvankam ili oficiale nomiĝas konsultaj. Agrable surprizas ankaŭ la atento, kiun la funkciuloj de Unesko – almenaŭ nepublike – dediĉas al la lingvo-problemo kaj lingva dimensio de la komunikado. Kiel d-ro Tonkin ŝerce sed prave diris fine de tiu longa tago kun sep kunsidoj, " la pordoj estas larĝe malfermitaj, necesas nur trairi ilin".

Sabaton, la 28an de novembro, en la sidejo de Unuiĝo Franca por Esperanto, okazis alia kunsido, kiun ĉeestis pluraj parizaj aktivuloj sur la kampo de la eksteraj rilatoj. Inter ili estis ankaŭ du reprezentantoj de la Plenum-Komitato de Sennacieca Asocio Tutmonda, s-roj P. Levy kaj K. Barković. En la tagordo troviĝis i.a. kunlaboro inter UEA kaj SAT pri la Jubilea Jaro 1987.

Praga solenaĵo, kiu aŭguras novajn dimensiojn por la movada turismo en Ĉeĥoslovakio: S-ro Vladimír Ječný, direktoro de la vojaĝoficejo REKREA (maldekstre), kaj d-ro Jaromír Jermář, prezidanto de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, subskribas kontrakton pri kunlaboro.

Kvankam tiel amasa movada migrado ne okazas ĉiujare inter malproksimaj kontinentoj, malpli longaj vojaĝoj estas regulaj kaj same regule neorganizitaj. Centoj da francoj, iom malpli da germanoj kaj svedoj, dekoj da japanoj, usonanoj, nederlandanoj, finnoj, italoj, britoj, bulgaroj, jugoslavoj, hungaroj ktp. preskaŭ regule venas al la kongresoj individue, do neorganizite el la turisma vidpunkto. Neniu ĝuas ajnan rabaton. Ĉiu pagas plenan prezon. Flugkompanioj kaj fervojoj gajnas nian movadan monon. Esperanto eble sur neniu alia vivokampo estas tiel abunde elprovita kiel en turismo. Niaj argumentoj nenie povus havi tiajn pezon kaj gravecon kiel sur tiu kampo. Tamen, niaj ĝisnunaj atingoj en turismo restas marĝenaj kaj kaosaj. Ĉiu ankoraŭ tiras al sia flanko kaj ĉiu iel sukcesas eltrovi ian propran direkton.

Antaŭ unu jaro, en nia numero de januaro 1981 (same sur la paĝo 2), d-rino Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA, skribis pri la movadaj taskoj post la grava atingo por Esperanto en la Monda Turisma Konferenco en Manilo, en septembro kaj oktobro 1980. Leviĝis en tiu teksto pluraj demandoj pri la agado renkonte al la venonta turisma konferenco samspeca, kiu okazos jam ĉi-jare en Meksiko. Kiuj landaj asocioj montris agemon sur la turisma kampo kaj kiajn rezultojn ili notas?

Elstaras ŝajne denove Hungario, al kiu ni grandparte ŝuldas ankaŭ la sukceson el Manilo. Hungara Esperanto-Asocio partoprenis pasintjare, kaj faros same ĉi-jare, en granda turisma ekspozicio en Budapeŝto. Eldoniĝis en tiu lando pluraj bonkvalitaj turismaj broŝuroj, inter kiuj ankaŭ *Baza Esperanto-konversacio,* kies eldonkvanto estis kvindek mil ekzempleroj.

Ankaŭ el Ĉeĥoslovakio venas bonaj novaĵoj. La 4an de decembro 1981, en Prago estis subskribita kontrakto inter la ŝtata vojaĝoficejo "REKREA" kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La kontrakto antaŭvidas ne nur la organizitan akcepton de Esperanto-grupoj el eksterlando, sed ankaŭ sendon de ĉeĥaj grupoj al aliaj landoj. Tiu dokumento parolas pri instruado de Esperanto al la oficistoj de la agentejo kaj pri edukado de Esperantaj vojaĝgvidantoj.

Tra pluraj lastaj jaroj Pola Esperanto-Asocio montriĝis plej agema pri amasa vojaĝigo de siaj membroj al diversaj eksterlandaj Esperanto-aranĝoj. Tial UEA en novembro pasintjare decidis subskribi apartan kontrakton pri kunlaboro kun PEA sur la turisma kampo. Pro la socia situacio en tiu lando, nun estas neklare kian sorton havos tiu kontrakto.

Ankaŭ en kelkaj aliaj landoj, denove orienteŭropaj, okazis kontaktoj kun la naciaj turismaj organizaĵoj. Ne estas al ni konate, ke io simila estis entreprenita en la aliaj partoj de la mondo. Restas ankoraŭ ĉirkaŭ duona jaro ĝis la Monda Turisma Konferenco en Meksiko. Restas do ankoraŭ tempo por rapide agi kaj pligrandigi nian turisman rikolton inter Manilo kaj Meksiko.

Savas la telefono

ĈIU, kiu iam provis klarigi, ke ŝi aŭ li bezonas "unu el tiuj aĵoj", kiujn oni metas sur la finon de tiu, "kiel-ĝinomiĝas-objekto", konas la problemojn, kiujn oni frontas provante en fremda lingvo interkompreniĝi kun vendisto. Laŭ la usona semajna magazino *Time* (n-ro de la 14a de decembro), similajn problemojn frontas ankaŭ la vendistoj mem en la butikuma centro de Lincoln Village en la norda parto de la usona urbego Ĉikago. Por kontentigi la bezonojn de siaj klientoj, kiuj ĉiam pli kaj pli ofte parolas nur japane, hispane, france aŭ greke, la vendistoj de Lincoln Village starigis telefonan lingvan servon, kiu al la fremdlingvanoj helpas aĉeti la bezonatajn varojn, kaj al la komercistoj vendi ilin.

Ĉiu magazeno en la butikuma centro havas afiŝon kun deko da aziaj kaj eŭropaj naciaj flagoj. La aĉetontoj montras al sia flago por konigi sian lingvon. La vendisto tuj vokas la lingvan servon, uzante por tio la speciale instalitan telefonan linion. La alvokitaj studentoj tradukas en la anglan la dezirojn de la klientoj.

La nova servo kun afiŝoj kaj sav-telefono postulis la komencan investon de 25 000 usonaj dolaroj. Aldoniĝas la monataj prizorgokostoj kaj – supozeble – pago al la tradukantoj. Tamen, la vendistoj opinias, ke temas pri saĝe elspezita mono. Ili nun pripensas la necesonaldoni pliajn lingvojn al sia telefona sav-servo.

Amuze, ĉu ne? Kion la homoj ankoraŭ elpensos antaŭ ol malkovri la ekziston de Esperanto, aŭ antaŭ ol ni atentigos ilin pri ĝiaj ekzisto kaj taŭgeco?

PUPTEATRO:

Ovidio en Velika Gorica

Okazis iel, ke la sekva raporto, kiu atingis nin jam meze de oktobro, flankeniris kaj maltrafis la decembran numeron. Ni devus vere elsendi alarmsignalojn, se subite mankus ĉi tiu tradicia raporto, se foje ĉesus okazadi ĉi tiuj pupteatraj festivaloj. Kial alarmi? Ĉar la 14 jaroj de la Pupteatra Internacia Festivalo pere de Esperanto estas unu el tiuj malmultaj trezoroj de la efika aplikado de la Internacia Lingvo ĉefe ekster la movadaj rondoj. Krome, kiam iom da milionoj da televidaj spektantoj vidas teatraĵon en Esperanto, eĉ se nur en unu lando, tiam la informa efiko de tio larĝe superas tiun de ĉiuj glumarkoj kaj aliaj verdstelaĵoj konsumataj de la tutmonda esperantistaro. Aldone, estas ja malklare, ĉu ni en la Movado sisteme kultivas la teatran arton, sed estas tute evidente, ke Zagrebo flegas por ni la pupteatran arton, sisteme kaj sindediĉe.

DUM 14 JARFINOJ tra la movada gazetaro aperas artikoloj pri Esperanto kaj pupteatro. Ankaŭ la pasinta oktobro ne estas escepto: inter la 8a kaj 11a de oktobro, en Zagrebo (Jugoslavio), okazis la 14a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF). Dum kvar tagoj en Esperanto prezentiĝis 8 profesiaj pupteatraj ensembloj el 6 landoj. Kun tri amatoraj ensembloj el Zagrebo, ludintaj en la kroata, la Festivalo ampleksis 35 prezentaĵojn. Ĵurnaloj, radio-elsendoj kaj televido abunde raportis pri ĉi tiu teatra festivalo en Esperanto.

La ĉi-jaran Festivalon gastigis la urbeto Velika Gorica, 15km sude de Zagrebo, kiu ne nur senpage disponigis siajn salonojn al la prezentaĵoj, sed kies loĝantoj entuziasme gastigis en siaj hejmoj dekojn da PIF-partoprenantoj. Tio konsiderinde kontribuis al la financoj de la Festivalo, kiu ĉi-jare devis prizorgi 110 ensemblanojn kaj 157 infanojn, ĉefe el Jugoslavio sed ankaŭ el Hungario kaj Pollando.

Tio estis granda pupteatra festo, kiu prezentis aktualajn stilojn de la malnova teatra branĉo, kiu malprave estas konsiderata nur porinfana arto. Tion plej trafe montris Pupteatro el Konstanco (Rumanio), kiu surscenigis la klasikaĵon *Metamorfozoj* de Ovidio. La granda romia poeto digne sonis en la Internacia Lingvo en la epopeo pri homoj kaj dioj. Elstara reĝisorado de Cristian Pepino, bonegaj lumefektoj, artismaj pupoj kaj dekoro de Eugenia Tarasescu-Jianu metas tiun ĉi majstroverkon inter la plej pintajn teatraĵojn, kiuj vidiĝis ĉe PIFoj. La mesaĝo de la prezentaĵo, pri strebo de la homoj al la progreso, en la interpretado de rumanoj, meritus montriĝi al vasta plenkreskula publiko.

Poloj el la Ŝtata Pupteatro "Lalka" el Varsovio prezentis rumanan tekston *Vendejo de ludiloj* en altnivela traduko de A. Pettyn. Ĉarma rakonto pri knabino, kiu aĝiĝas per akiro de ĉiu nova ludilo. Bona, tradicia pupteatra esprimo (bonvenus iom da dramaturga interveno en la densan tekston) kaj pli ol adekvata Esperanto-uzo, por kiu la ensemblo gajnis la 2an lingvan premion por kolektiva ludo.

Tradicia laŭ rakonto, sed moderna laŭ pupfarado, estis la prezentaĵo de *Tri sekretoj de sorĉistinoj* de H. Paukŝs. La Ŝtata Pupteatro el Rigo, Latvio (Soveta Unio), konfirmis per ĝi la bonan reputacion de la soveta teatra arto, samkiel tiun de Esperanto-aktiveco en la baltaj sovetaj ŝtatoj. La rakonton povos ĝui ankaŭ jugoslavia televida publiko, ĉar Televido Zagreb dum ĉi tiu sezono elsendos la 60-minutan Esperanto-rakonton.

Tute infanan tekston de V. Lifŝic prezentis la junmembra Ŝtata Pupteatro el Krĝali (Bulgario), kies aktoroj sursceneje helpas vivigi grandajn pupojn, kiuj rakontas siajn travivaĵojn el Lando Meralikundio. Infana publiko, ruĝvanga pro ekscitiĝo, entuziasme atribuis al tiu prezentaĵo la unuan infanan premion. La ensemblo gajnis ankaŭ la premion por kolektiva lingvouzo.

Infanojn kaj plenkreskulojn ĉarmis la prezento de la kataluna grupo "L'Estaquirot" el Barcelono, kiu ludis en bonega tradicio de foireja teatraĵo: kun cirkaj herooj, klaŭnoj, dresistoj, ekvilibristoj, inventistoj,

La infana premio de la 14a Pupteatra Internacia Festivalo iris al la hipopotameto Borja el Bulgario.

muzikistoj, en aktuala rakonto pri medimalpurigo; la prezentaĵo nepre estis la plej gaja festivala ero. Ĝia membro Joan Inglada i Roig gajnis la ĉi-jaran premion "Jozefo Petrin", pro la uzo de Esperanto sur kaj ekster scenejo.

Inter la jugoslavaj teatroj el la urboj Zemun, Sarajevo kaj Niŝ elstaris Mima Janković per sia teatra senpereco kaj lingva fluo en *Klaŭnaj ludoj*.

Konklude: la 14a Pupteatra Internacia Festivalo estis interesa teatra renkontiĝo. La lingvo en kiu tiel majstre prezentiĝis romia poeto, mezepoka foirdresisto, klasika infana fabelo kaj moderna teksto pri bono kaj malbono, estas ja mirinda fenomeno. (Sed ĉu tion necesas diri al vi?)

Spomenka Štimec

SEMINARIO PRI PLANADO:

Valora konatiĝo kun diferencoj

DUM KVAR TAGOJ en novembro, trideko da funkciuloj kaj aktivuloj de la Movado restadis kune en Germana DR, kun nenio alia por fari krom renkontiĝi, kunsidi, diskuti kaj pensi. La loko estis Bad Saarow, apudlaga feria centro, iom ekster orienta Berlino. Ĉeestis homoj el dek kvar landoj de orienta kaj okcidenta Eŭropo kaj Usono, de la 16a ĝis la 21a de novembro 1981.

La seminario estis organizita de la Komisiono pri Planado de UEA sub la gvido de d-ro Renato Corsetti. Ĝi celis difini la prioritatajn agadkampojn de UEA por formi bazon de nova laborplano. La ĉeestantoj ankaŭ dediĉis unu tagon al diskutado pri preparoj por la jubileo de Esperanto en 1987. La teknikajn flankojn de la aranĝo kaj la gastigadon prizorgis Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR.

Dum la unua tago, oni ĉefe konsideris la ĝeneralan direkton, kiun la Movado devus preni en la estonteco: ĉu estas preferinde koncentri la agadon al kreo de amasmovado, aŭ ĉu estas pli utile celi precipe al kontaktoj kun limigita nombro da influhavaj instancoj kaj individuoj, kiuj povus helpi la progreson de Esperanto? La ĉeestantoj aŭskultis plurajn referaĵojn, kiuj prezentis variajn vidpunktojn sur la gamo inter la du ekstremoj. Kvankam partoprenis relative malmultaj gejunuloj, oni aŭdis voĉon de almenaŭ parto de la junulara movado pere de la t.n. Manifesto de Raŭmo. Tiu dokumento, kiu tamen ne esprimas la oficialan opinion de TEJO, estis subskribita de 88 homoj dum la TEJO-Kongreso en Finnlando, en 1980. Estis ankaŭ raporto pri detala enketo farita de ĈeĤa Esperanto-Asocio ene de ĝia membraro.

Post ekskursa tago en orienta Berlino, oni daŭrigis la laboron. Skemon por la diskutado provizis d-ro Werner Bormann per tabelo, kiu dividis la konsideratan agadokampon en kvar ĉefajn rubrikojn: informado, instruado, aplikado kaj samtempa analizado de la disponataj rimedoj. La ĉeestantoj formis laborgrupojn por decidi, kiuj estas la prioritataj terenoj sub tri el tiuj rubrikoj. Ili ne bezonis okupiĝi pri la unua, informado, kiun oni jam detale traktis dum Seminario pri Informado en oktobro (vidu la novembran numeron).



Bad Saarow: R. Corsetti, T. Vaskó (meze) kaj H. Tonkin

En la lasta tago oni aŭdis mallongajn raportojn pri la konkludoj de la tri grupoj, kaj poste oni daŭrigis per diskutado de la plano por la jubilea jaro. La raportoj de la laborgrupoj formos la bazon de provizora nova laborplano. Tiu, kun la reformulita plano por la jubilea jaro, estas baldaŭ sendota al ĉiuj movadaj instancoj por plua konsidero.

Komparante siajn enlandajn situaciojn, la partoprenantoj konstatis, ke ekzistas tre grandaj malsimilecoj, tiel ke la sperto de unu ne nepre taŭgas por alia. La detala pritraktado en malgrandaj grupoj ankaŭ malkovris sufiĉe evidentajn diferencojn inter la laborsistemoj de diskutantoj el malsamaj landoj. Necesas antaŭvidi kaj konsideri tiujn diferencojn, kiam oni planas postan kunlaboron. Verŝajne tio estis la plej valora aspekto de la seminario, al kio aldoniĝis la ebleco de trankvila renkontado kaj diskutado inter movadaj funkciuloj (kvin aŭ ses ĉeestantoj estis prezidantoj de landaj asocioj) kaj konataj aktivuloj. Interalie ĉeestis kvin el la ok estraranoj de UEA, kaj ili kunsidis aparte unu fojon dum la restado.

A.B.

D-ro Werner Bormann klarigas la "Tabelon de Bad Saarow".

NOVA ĈEFVERKO EN LA SERIO ORIENTO-OKCIDENTO:

Camões kaj lia epopeo pri portugaloj — "luzidoj"

La luzidoj (1572), de Luiz Vaz de Camões (1524-1580). El la portugala trad. Leopoldo H. Knoedt (1921-). Antaŭparolo de Humphrey Tonkin. Enkonduko de Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1980. 464p. Ilus. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 14. Prezo: 43,20 gld.

Ĵurnaloj anoncis antaŭnelonge, ke la mongola junularo frontas dilemon, kiamaniere fieri pri la historio de sia lando. Ĉiu nacio iel fieras pri sia pasinteco. Alie, kiel povas daŭri popolo nacie? Sed dum multaj jaroj la mongola eduksistemo volis forgesi Ĝingis-Ĥanon, ignorante liajn farojn. Tamen nun la junularo emas admiri la forton kaj kuraĝon de siaj prauloj. Tial, en tiu eduksistemo baldaŭ necesos rerigardi la pasintecon kiel historian realon, nekonfliktan kun la nuntempo.

Esploro en la historio, por atingi objektivan sintenon rilate al propraj kredoj, devenas de sana sinteno. Evidentas, aldone, ke artaĵoj (inkluzive de popola arto, kantoj ktp., same kiel arkitekturo, pentrado kaj famaj poemoj) helpas nin difini la kulturon kiu kreis ilin kaj kiun ili apogas kaj priatestas. El tiu vidpunkto, epopeoj

Luzo = filo de Bakĥo kaj legenda prapatro de la portugaloj.

Post kvar jarcentoj Camões daŭre restas la plej eminenta portugallingva aŭtoro

entenas centran gravon, ĉar ili estas kaj majstraj artaĵoj kaj glorigantaĵoj pri genta historio kaj kulturo, kantante heroajn farojn. Aliflanke, kiam ano de popolo tradicie malamika al iu gento legas ties epopeon, lia reago estos almenaŭ maltrankvila, des pli se la verko priskribas konkerojn ĝuste kontraŭ tiu popolo. Malmultaj posedas la intelektan kapablon rekoni la universalecon de epopeaj sentesprimoj ene de la regno de arta kreado.

Kompreneble, tiu kapablo ne necesas kiam oni legas tian belan epopeeton, kia estas "La vojaĝo de la maorioj al Nov-Zelando" (B. Clark), rakonto pri venkita, rifuĝserĉanta gento, kiu bezonas lukti nur kontraŭ la maro. Nek ĝenas iun ajn legi pri Homeraj aŭ Vergiliaj herooj, ĉar jam malaperis la civilizoj kontraŭ kiuj ili batalis. Nek ĝenas la sagaoj, ĉar ilia temo estas plejparte loka intervenĝado.

La luzidoj, male, kantas okazintaĵojn pli proksimajn al ni. Laŭ la antaŭparolo de Humphrey Tonkin, "tiu

LIBROKOLEKTO KIU JUBILEAS:

Serio Oriento — Okcidento

UNESKO en 1981 festis la 25an jaron de sia grandprojekto pri la reciproka aprezado de la kulturaj valoroj de Oriento kaj Okcidento. Ankaŭ UEA estus devinta festi la 20-jaran ekziston de sia "Serio Oriento-Okcidento". Kurioze estas, ke en tiuj 20 jaroj, de post la apero de *Malsata ŝtono* en 1961, la Serion eniris ĝuste 20 renomaj verkoj, el kiuj du aperis sen la seria numero. Aliaj du el tiu dudeko estas jam presitaj kaj oni ĉiutage atendas ilian efektivan aperon. La laste menciita verko (n-ro 18) nun estas presata kaj aperos supozeble en 1982.

Kvankam lanĉita kaj daŭre prizorgata de UEA, la Serio tra la jaroj alprenis ĉiam pli kaj pli la karakteron de vere internacia entrepreno. Ĝis nun kunlaboris 14 eldonejoj el 12 landoj de 3 kontinentoj. Dum Japanio reprezentiĝis per kvar libroj, ankoraŭ mankas verkoj kiuj reprezentus Afrikon, Aŭstralazion, Nordan kaj Sudan Amerikojn. En tiuj dudek jaroj ekde kiam la Serio ekzistas, aperis pluraj gravaj verkoj, kiuj ĝin iel maltrafis (*Don Quijote*, *Noveloj de Lusin*, *Doña Bárbara* ktp.). Estus utile, se la movadaj eldonejoj pensus pri la Serio, kiam ili pretigas la eldonon de nova grava libro. Pri tiaj demandoj oni skribu rekte al la estrarano de UEA pri kulturo aŭ al la Centra Oficejo.

Ĉi-sube aperas la kompleta listo pri la nuna stato de la Serio Oriento-Okcidento. Eventualajn mendojn oni direktu al la Libroservo de UEA, pri kies liverkondiĉoj bonvolu legi la finan alineon de la rubriko "Laste aperis. . ." en ĉi tiu revunumero.

1. Malsata ŝtono, R. Tagore (1861-1941). El la bengala tr. L. Sinha. Malmö: Eldona Societo, 1961. 128p. Ilus. 21cm. Bindita. Sep noveloj. Prezo: 21,00 gld.

2. Rakontoj de Oogai, Oogai Mori (ps. de Rintarô Mori, 1862-1922). El la japana tr. diversaj. Tokio: Japana E-Instituto, 1979 (represo). 117p. 22cm. Bindita. Kvar historiaj noveloj. Prezo: 18,30 gld.

3. La naŭzo, Jean-Paul Sartre (1905-1980). El la franca tr. R. Bernard. Rotterdam: UEA, 1963. 222p. 21cm. ISBN 92 9017 010 7. Ekzistadisma romano. Prezo: 7,50 gld.

4. Kalevala, Elias Lönnrot (1802-1884). El la finna tr. J.E. Leppäkoski. **Elĉerpita.**

kiu deziras kompreni la historian periodon en kiu kreiĝis la grandaj mondaj komercaj imperioj kaj la moderna nacia ŝtato, komprenu Camões. Same tiu, kiu deziras kompreni la senripozajn aspirojn de la okcidenta civilizo." Tamen, la fundamentaj aspiroj de la portugaloj ne malsimilis tiujn de aliaj imperialistoj, okcidentaj aŭ orientaj. Tiaj aspiroj ĉiam havas la saman homan kialon. Eble tio, kio diferencigas la etoson de *La luzidoj* disde la plejparto de la poeziaj imperikonstruaj priskriboj, estas la fakto ke, preskaŭ ĉie kien iris la portugaloj, konkerante orientajn komercajn marvojojn, ili povis identigi tiujn homojn, kiuj ilin kontraŭstaris, kun siaj tradiciaj malamikoj. Ni memoru, ke Portugalujo formiĝis kaj ŝuldis sian ekziston al tio kion oni juĝis rekonkero de kristana teritorio desub la islama influo. La idealo mem kiu dum generacioj movis la portugalojn (krom la minacoj fare de Kastilio) estiĝis el preskaŭ konstanta lukto kontraŭ islamo.

Kiam Vasko da Gama atingis la orientafrikan marbordon, li trovis tie koloniojn de muzulmanaj komercistoj kaj registoj. Atinginte Kalikuton, li vidis reĝon sub islama influo. Tia estis la portugala sperto en la plejparto de ĝia malproksimorienta koloniado, kiu pro tio estis religie pravigata kiel ia krucmilito. Rezulte, troviĝas en *La luzidoj* malamika sinteno pri islamo, sed nur en kelkaj strofoj. Eble tio ŝajnos ofenda, laŭ iuj esperantistoj kiuj forte ligas nian lingvon kun rektaj streboj atingi mondpacon. Tamen, ni devus memori ke la verko estas dokumento respegulanta la siaepokan pensmanieron. Kompreneble, tio sola ne liverus al ĝi senmortecon, se ĝi ne estus ankaŭ majstroverko.

La majstro, Camões, estis antaŭ ĉio granda lirika poeto. Se li poste prenis alispecan liron, kune kun la unua, tio ŝuldiĝas al cirkonstancoj. Oni igis lin soldat-



"Apero de la giganto Adamastoro ĉe la preteriro preter la Kabo de l' Turmentoj", desegnaĵo de Fragonard

5. Martín Fierro, José Hernández (1834-1886). El la hispana tr. E. Sonnenfeld. La Laguna: J. Régulo, 1965. 289p. Ilus. 22cm. Gaŭĉa eposo. **Provizore neaĉetebla.**

6. Reĝo Lear, William Shakespeare (1564-1616). El la angla tr. K. Kalocsay. Rotterdam: UEA, 1966. 160p. 21cm. ISBN 92 9017 013 1. Tragedia dramo. Prezo: 9,00 gld.

7. Kvin virinoj de amoro, Ihara Saikaku (1642-1693). El la japana tr. M. Miyamoto. Oosaka: Pirato, 1966. 159p. Ilus. 22cm. Bindita. Klasikaj popularaj rakontoj. **Provizore neaĉetebla ĉe UEA.**

8. La spleno de Parizo, Charles Baudelaire (1821-1867). El la franca tr. P. Lobut. København: Koko, 1967. 125p. 21cm. Bindita. Prozpoemaro. Prezo: 14,10 gld.

9. El la vivo de Syunkin, Zyun'itiro Tanizaki (1886-1965). El la japana tr. M. Miyamoto kaj T. Isiguro. Osaka: Pirato, 1968. 145p. 21cm. Du dramoj kaj du noveloj. Prezo: 12,30 gld. (broŝurita); 19,50 gld. (bindita).

10. La Nobla Korano. El la araba tr. I. Chiussi. Tehrano, 1977 (neindikita; fotorepreso de 2a eld., 1970). 20+667p. 22cm. Bindita. Paralela eldono (araba-Esperanta) de la sankta libro de la islamo. Prezo: 66,00 gld.

11. Neĝa lando, Yasunari Kawabata (1899-1972). El la japana tr. G. Konisi. Tokio: Japana E-Instituto, 1971. 118p. 22cm. Bindita. Amromano. Prezo: 14,40 gld.

12. Je la flanko de la profeto, Italo Chiussi (1919-1973). Antverpeno: TK, 1978. 362p. Ilus. 21cm. ISBN 90 6336 003 7. Pri Muhammad kaj la islamo. Prezo: 33,00 gld.

13. Brand, Henrik Ibsen (1828-1906). El la norvega tr. E.A. Haugen. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1978. 320p. Ilus. 21cm. ISBN 90 6336 004 5. Versa dramo. Prezo: 21,00 gld. (broŝurita); 33,00 gld. (bindita).

14. La luzidoj, Luiz Vaz de Camões (1524-1580). El la portugala tr. L.H. Knoedt. Chapecó: Fonto, 1980. 464p. Ilus. 21cm. Epopeo. Prezo: 43,20 gld.

15. Elektitaj fabloj, Ivan Andrejevič Krilov (1768-1844). El la rusa tr. S.G. Rublov. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 336p. Ilus. 21cm. ISBN 90 6336 009 6. Poemoj. Prezo: 21,00 gld.

16. Sonetoj, William Shakespeare (1564-1616). El la angla tr. W. Auld. Pisa: Edistudio, 1981. Baldaŭ aperonta.

17. Tutmonda sonoro. El diversaj lingvoj tr. Kálmán Kalocsay (1861-1976). Budapest: Hungara E-Asocio, 1981. Majstraj tradukoj el la monda poezio. Baldaŭ aperonta.

18. Ponto super Drino, Ivo Andrić (1892-1975). El la serba tr. A. Sekelj. Romano. Nun presata en Jugoslavio.

Nenumeritaj verkoj en la Serio:

La Dia Komedio, Dante Alighieri (1265-1321). El la itala tr. G. Peterlongo. Milano: SIEI, 1979 (2a eld.). 55+709p. Ilus. de Sandro Botticelli. 28cm. Dulingva eldono (itala-Esperanta). Prezo: 69,00 gld.

Aniaro, Harry Martinson (1904-1978). El la sveda tr. W. Auld kaj B. Nilsson. Malmö: Eldona Socieo, 1979. 174p. 22cm. Bindita. Eposa poemo pri paneinta kosmovojaĝo. Prezo: 37,50 gld.

iĝi, kaj per epopea poezio li prikantis la seniluziiĝon pro malsamo inter la idealismaj, patriotaj celoj de Vasko da Gama kaj la hipokriteco, korupto, sklaveco, kruelo, bigoteco kaj stulteco, kiujn li observis en la imperio al kiu li dediĉis sian vivon.

Naskita en Lisbono, Luis de Camões estis portita, trijara, al Koimbra, por eviti peston. Tie li restis dum parto de sia juneco kaj akiris eksterordinarajn klasikajn sciojn. Ankoraŭ sufiĉe juna, kun rompita koro pro senespera enamiĝo, li revenis al Lisbono kiel studdirektoro de altnobela junulo. Tie, per sia kortega poezio, li baldaŭ gajnis konsiderindan reputacion kaj la ĵaluzon de rivaloj. Li ankaŭ enamiĝis al juna nobelino, kiu fariĝis la dumviva muzo de la plejparto de liaj ampoemoj, sed kiun li neniam povis edzinigi. Petite verki dramon, li naive elektis temon en kiu reĝaj familianoj trovis ian analogecon al sia propra situacio, kaj oni ekzilis Camões por dujara militservo en Maroko, kie li perdis okulon. Reveninte al Lisbono, li ne sukcesis reakiri kortegan favoron kaj devis vivi en malriĉo. Post stratbatalo li ree trovis sin ekzilita, kaj soldato, ĉi-foje en Goa (Hindujo). Post la militservo, li ĝuis la protekton de unu neofta guberniestro kiu ŝatis poezion, ĝis oni sendis lin al Makao. Reirante al Goa kelkajn jarojn poste, la poeto suferis ŝippereon proksime al la Mekonga Delto. En tiu ŝippereo li perdis sian tutan havaĵon escepte de la manuskripto de *La luzidoj*, kvazaŭ mirakle savita. En Angolo Camões loĝis kelkajn jarojn, enamiĝinte al hinda sklavino, pri kies beleco li verkis poemojn mokotajn de liaj amikoj, kiuj opiniis ke bruna haŭto ne meritas sonetojn. Post pliaj aventuroj, la poeto revenis hejmen. Per helpo de malnova amiko, kaj kun la aprobo de la reĝo Sebastiano (por kiu li aldonis al la manuskripto omaĝajn strofojn), Camões finfine sukcesis eldoni sian vivoverkon *La luzidoj*. Tiu reĝo, malkapabla, fanatika, baldaŭ pereis kun preskaŭ sia tuta armeo. Portugalujo estis lacega pro korupto, imperia trograndiĝo, fuŝa administrado kaj la sufoka medio de la inkvizicio. Fakte, necesis eĉ la inkvizicia permeso por la eldono de *La luzidoj*, pro kio ĝi entenas strofojn celantajn plaĉi al la cenzuristoj.

"Camões en la groto de Makao", de A.-J. Desenne. Dek ses belaj ilustraĵoj, de diversaj manoj, ornamas la libron.

Camões mortis dum alia pesto la saman jaron en kiu Portugalujo perdis sian sendependon. Ĉar lia patrino povis pagi nek ĉerkon nek mortotukon, admiranto donacis la lastan, kaj la plej eminenta portugala poeto estis enterigita sen diservo en komuna tombo.

Kelkaj kleruloj opinias ke grandaj epopeoj aperas nur kiam nacioj troviĝas en dekadenco. Se tiu aserto ne estas ĝusta rilate al multaj verkoj, oni povas apliki ĝin almenaŭ al *La luzidoj*. Fakte, Camões konsciis pri tio. Tamen, sesdek jarojn poste, portugalaj nobeloj ribelis kaj forigis la habsburgan regon. Sendube *La luzidoj* iel inspiris ilin.

Iuj kritikistoj sugestas ke *La luzidoj* estas manierisma verko. Du kialojn oni povus mencii por tiu teorio. Unue, ĝia sinteno ŝajnas fluktui inter optimismo kaj pesimismo, t.e. inter prognozoj adresataj al Vasko da Gama pri plua nacia gloro, kiu fakte estas pasintaĵo rilate la aŭtoran tempon, kaj moralismaj atakoj al samtempa korupto, egoismo kaj maljusto, kontraste kun pasinteca kaj kvazaŭ-estonta virto. La dua kialo estas la speciala maniero uzi abundajn klasikajn analogiojn. Aliflanke, tiujn Camões ne aldonis kiel nurajn pedantaĵojn. Ili formas integran parton de la tutaĵo, ĉar la portugaloj, laŭ la epopeo, superas la antikvulojn, kaj por montri tion necesas la antikvaj aludoj.

La simbolo de Bakĥo kiel malamiko de la luzidoj, kaj tiu de Venera kiel ilia helpanto, entenas ampleksan signifon. Ĉar Venera estas mardiino, la simbolo de geedziĝo de Portugalujo kun la maro povas disvolviĝi per erotikaj beligaĵoj. Bakĥo, interalie simbolo de ebria malordo, sed precipe dio de la Oriento, volas ke la luzidoj ne eniru lian sferon. Ni rajtas rideti pri tia alegorio, sed ĝi aldonas multan belon al la verko. Admirindaj estas la epizodo en kiu la nereidinoj retropuŝas la ŝipon por ke ĝi ne rompiĝu sur la rokoj, kaj la erotika sceno en la Insulo de la Amo. Aldone, la Marsa sono de la strofoj rakontantaj portugalan historion, la priskriboj de martempestoj, de la temploj de Kalikuto, de la loĝantoj de Afriko, la aŭdaca mikso de kristanaj ideoj kaj paganaj metaforoj, ĉio tio multe riĉigas la Esperantan literaturon per la majstra traduko de Leopoldo Knoedt. (Mi ne havis okazon kompari ĝin kun la traduka fragmento de Kalocsay aperinta en 1931.) Oni povus diskuti pri kelkaj detaletoj. Sed ne decas ĉikani. La notoj, glosaro kaj konkordanco estas bonegaj. Belajn ilustraĵojn, precipe tiujn de Fragonard, la eldonisto bonguste elektis.

Pierre Ullman (Usono)

67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Antverpeno (Belgio) 1982 07 24-31

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Zoologa Rektoro en la Zoologia Ĝardeno. La Estraro dedidis, ke la Rektoro de la Internacia Kongresa Universitato estu d-ro Wim De Smet, estro de la fako pri ĝeneralaj sciencaj servoj de la Reĝa Belga Instituto por Natursciencoj en Bruselo. D-ro de Smet estas vaste konata kiel esperantisto kaj specialisto pri marmamuloj; li ankaŭ estas ano de LKK. Ni memorigas, ke la antverpena kongresejo troviĝas en la Reĝa Zoologia Ĝardeno.

Filatelo. Jam en oktobro ni anoncis, ke denove aperos speciala porkongresa poŝtmarko. Tiu eldoniĝos la 6an de junio kun valoro de 10 bfr, t.e. sufiĉe por enlanda letero aŭ tutmonda poŝtkarto. Mendilo troviĝos en la Dua Bulteno, kiu aperos en marto.

Foto: A. De Belder

Antverpeno: Kial tiom da ritmo kaj vervo en la ŝtona trupo de la Brabo-Fontano? Ĉu la ŝtonajn figurojn dancigas la kariljona muziko el la turalto de la katedralo?

Arto kaj amuzo. Kuraĝige granda nombro da artistoj jam proponis sin por la diversaj artaj eroj de la programo. Nun estas konsideratataj pluraj proponoj por amuzi tiel la infanojn kiel la plenkreskulojn (pupteatro, magio), pluraj eroj por gajigi (kanthoroj, kabaredo), pluraj prezentaĵoj por pli profundaj emocioj (teatraĵoj, klasika muziko) . . . kaj eĉ pli! Sen malkaŝi tro da sekretoj, ni povas promesi minimume unu kariljonkoncerton.

Generacia aspekto. Oni esperas efektivigi en Antverpeno la 19an Infankongreseton. Ĝia realigo dependas de sufiĉaj aliĝoj, do se viaj infanoj aĝas inter 6 kaj 13 jaroj kaj bone parolas Esperanton, anoncu ilin jam nun al la konstanta adreso. Kotizoj kaj aliaj informoj verŝajne aperos en la Dua Bulteno.

Karavanaj aliĝoj. En lastatempa voĉdono la Komitato de UEA aprobis regularon pri karavanaj aliĝoj al la UK. La plej grava rezulto de tio estas la starigo de "karavana kotizo" por grupoj de minimume 25 kongresanoj. La karavana kotizo egalas tiun de edz(in)o de individua membro de UEA en la periodo kiam okazos la transpago de kotizoj. Gvidontoj petu regularon.

Jam tri karavanoj. Grupan vojaĝon al la UK jam anoncis: Madrida Esperanto-Liceo, Calle Atocha 98 - 4, Madrid 12, Hispanio (kiu ankaŭ iros al la IJK en Loveno); Vojaĝservo de ELNA, p/a Howard Travel Service, 578 Grand Avenue, Oakland, CA 94610, Usono; kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilskà 10, CS - 110 00 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

Fervojaj rabatoj. Jen kiel vi ankaŭ povas ŝpari: por la belga parto de la vojaĝo al kaj de Antverpeno estos havebla rabato de 25%. LKK nun pretigas specialajn rabatilojn, kiuj estos havendaj tiucele. Oni enketas la eblecojn por rabatoj ankaŭ por la tuta vojaĝo el eksteraj landoj kiam kongresanoj vojaĝas grupe.

Malaltekosta loĝado. LKK sukcesis aranĝi plurajn malaltekostajn loĝeblecojn. Ekzemple, en plurpersona ĉambro en studenta domo, inkluzive de matenmanĝo, estos eble pagi po nur 200 bfr (12,60 gld) tage. Eĉ pli monŝparaj eblecoj ekzistas por tendemuloj – senkostaj, ŝtate subvenciataj amastendoj estos mendeblaj. Ilia bone ekipita tendumejo troviĝas malĵongan distancon de la centro de Antverpeno, kaj la sola kosto estos la luprezo de la loko mem, ne de la tendoj, litoj, ktp. Mendiloj aperos en la Dua Bulteno. Por tiuj, kiuj volas loĝi en pli konvencia maniero, oni antaŭvidas kontentigan elekton de hotelĉambroj.

Statistiko. Ĝis la mezo de decembro aliĝis ĉ. 470 gekongresanoj el 42 landoj. Ĉefe reprezentitaj estas Belgio, FR Germanio, Francio, Nederlando kaj Svedio, sed venos belaj trupoj ankaŭ el Brazilo kaj Japanio.

Oazoj de granda dezerto

La klasika periodo; Tra la parko de la franca poezio III. Enkondukoj, notoj kaj tradukoj el la franca de Gaston Waringhien (1901-). Ascoli Piceno: Gabrielli, 1980. 252p. 20cm. Plejado 14. Dulingva eldono (franca kaj Esperanto). Prezo: 24,00 gld.

Ĉi tiu antologio prezentiĝas kiel la sekvo de *La renesanca periodo*, kompilita de la sama eminenta tradukisto por la sama eldonejo en 1977. La kolekto dividiĝas en kvin partojn: Malherbo kaj lia skolo – La manierismo, ĝiaj majstroj kaj majstretoj – La grandaj klasikuloj – La novklasikuloj – Popolkantoj. Enkondukoj kaj notoj feliĉe klarigas la tekstojn ne disigante la literaturan historion de la historio socia, ekonomia kaj politika.

Jam de trideko da jaroj, en la poezio de la 17a jarcento, la baroko estas tio kio precipe interesas la serĉistojn kaj la legantojn. La klasikuloj, malgraŭ sia sendankeco al siaj anoncantoj, nur reprenas, cetere kun pli da dogmemo, la Plejadan teorion de la imitado. Tiu koncepto, fekunda en la teatro (Corneille, Molière, Racine), montriĝis pli-malpli pereiga por la lirika poezio. Ekster la granda triopo baroka (Théophile de Viau, Saint-Amant, Tristan L'Hermite), kiu sin tenas marĝene de la Malherba doktrino, nur la genio de La Fontaine konstruis verkon en kiu la kulturo feliĉe kuniĝas kun la plej profunda originaleco.

Sekve, Waringhien ne eraras dediĉante la leonan parton de la kolekto al la majstroj de la baroko, sed li maljuste algluas al ili la etiketon de "manierismo", kiu konvenas nur por la "majstretoj" de la preciozeco. En la *Franca literaturo I-III*, kies du unuaj volumoj aperis serbokroate en Sarajevo (1976) kaj Belgrado (1978), la jugoslava deksepisto Slobodan Vitanović tre ĝuste rimarkigas ke "la preciozeco devenas de la baroko, estas parenca al ĝi, sed diferencas de ĝi". Waringhien prilumas tiel per iom neordinara lumo grandajn poetojn kiuj estas konsiderataj el alia angulo: Corneille, Molière, Racine. Sed li legigas ankaŭ poetojn kiuj troviĝas plej ofte nur en antologioj kaj tamen indas esti pli konataj. Tiamaniere oni legas ĉi tie kelkajn sonetojn de Vion d'Alibray, kiu ĝis antaŭ kelkaj jaroj restis tute forgesita. Por ni, kiuj vivas en baroka epoko kaj ŝuldas samtempe multon de nia gusto al Nerval kaj Baudelaire, en la antologio de Waringhien troviĝas mirindaj surprizoj!

En la granda elruiniĝo de la poezio de la 18a jarcento dronis multaj nomoj. Inter la maloftaj poetoj kies memoron la posteularo konservis elstaras la granda figuro de André Chénier, al kiu plene konvenas la epiteto de "novklasikulo" ("Ni jam pri pensoj novaj antikvajn versojn faru!"). Sed ne per li la aŭtoro kronas sian antologion: ĉe la fino ni trovas kelkajn popolkantojn, ĉarme naivajn en sia natureco.

Ĉiu poezia traduko povas esti konsiderata laŭ tri aspektoj: semantika, stilistika kaj pragmatika. Evitinte la absolutigon de iu ajn el ili Waringhien optimume atingis la ĝeneralan adekvatecon. Li sukcesis transdoni la fluecon de la Voltaira verso, sprita kaj konciza, kaj eĉ konservi altgrade la muzikan ĉarmon de la Racina poezio. Sufiĉe por inde festi la 80an datrevenon de sia naskiĝo!

Petar Stefanović (Jugoslavio)

Iom pri Afriko

Baladoj el Asante / Ashanti ballads, de Ko Nimo. Trad. el la angla A. Goodheir. Glasgow: Eldonejo Kardo, 1981. 42p. 21cm. ISBN 0 905149 17 3. Trilingva eldono. Prezo: 6,00 gld.

La broŝureto enhavas 16 Esperantajn tradukojn laŭ anglaj versioj, kiuj baziĝas sur la originaloj en la afrika lingvo, asante-twi, el kiuj dek estas aldonitaj je la fino de la libreto. "En 1957", tion ni legas en la enkonduko, "kiam la Ora Marbordo fariĝis Ghana, Ko Nimo akiris nacian famon pro siaj prezentoj de popola muziko, uzante tradiciajn instrumentojn." Legante la poeziaĵojn, oni do nepre ne forgesu, ke mankas al ili la akompanaj muziko kaj homa kanto.

Nomi tiujn poeziaĵojn baladoj estas maltrafe. Mankas al ili ĉio drama. Ili pli vere estas fablosimilaj versrakontoj, kiuj komenciĝas, ekzemple, per "Birdeto ... al amiko iris ..." aŭ "Testudo leporon ... defiis", kaj kiuj ofte finiĝas per instruo, ekzemple, "Se inter amikoj mankas akordo, / Ne tro postulu, sed agu laŭ ordo". Oni ne atendu de tiuj versrakontoj iun malkovron pri la antaŭkolonia praa afrika kulturo. Trivialigitaj kristanaj ideoj kaj aludoj al la moderna vivo kaj tekniko lokas la versaĵojn en pli freŝdatan tempon. Ilia formo estas malmulte prizorgita. Kio restas, estas konatiĝo kun fremdaj vivkondiĉoj.

Rikardo Ŝulco (FR Germanio)

Poemoj por aŭskulti

"La korvo" kaj aliaj poemoj, de E.A. Poe, O. Wilde, G. Junqueiro kaj C. Neto. El la angla kaj portugala tradukis Leopoldo Knoedt (1921 -). Rio de Janeiro/Chapecó: Brazila Esperanto-Ligo/Fonto, 1981. Kaseto kun tekstokajero (18p. 22cm). Deklamas L. kaj I. Knoedt. Prezo: 21,00 gld.

La ekapero, en oktobro 1980, de la beletra revuo *Fonto* sur la esperantista sceno estis kompreneble tre bona kaj esperiga fakto, ne nur pro la eminento de

ĝia ĉefredaktoro (W. Auld) kaj de pluraj kunlaborantoj, sed ankaŭ pro ĝia amplekso (44 paĝoj ĉiunumere), kaj pro ĝiaj iom eksterordaj iniciatoj.

La recenzata kaseto, ekzemple, volas memorigi, ke poezion oni ĉefe aŭdas, kaj nur pro teknikaj kialoj oni devas ĝin legi aŭ skribi. La Esperanta poezio havas tro skriban formon, laŭ mia orelo: tio eble venas de la fakto, ke poeziaj libroj svarmas, sed mankas kasetoj kaj publikaj laŭtlegoj. *Fonto* kaj Brazila Esperanto-Ligo per tiu ĉi eldonaĵo provis plenigi tiun mankon.

Tamen mi devas aldoni, ke en ĝi kelkaj aferoj ŝajnas maltrafaj: ĉefe, la elekto de la poemoj. Mi ne scias, ĉu mian juĝon influas ia eŭropismo, sed Guerra Junqueiro kaj Coelho Neto, almenaŭ laŭ la ĉi-enmetitaj verkoj, ne ŝajnas al mi aparte fortaj poetoj: en "Vojaĝantaj turtoj" prosperas iom kliŝa simbolismo, kaj "La karitato kaj la justeco" estas embarase bombasta. "La korvo" de E.A. Poe furoris dum la pasinta jarcento, sed tion ĝi ŝuldas al siaj sombre romantismaj efektaĉoj. Pli interesa estas la longa poemo de Oscar Wilde "La balado de prizono Reading", kiu okupas unu tutan flankon de la kaseto. En ĝi, Wilde priskribas la abomenajn kondiĉojn de la prizono, kie li estis enfermita pro samseksemo.

Kiel ajn pri la valoro de ĉi tiuj poemoj, ilia traduko fare de Leopoldo Knoedt estas majstra. Mi komparis ĝin kun la anglaj originaloj de Poe kaj Wilde kaj, kvankam pedanto povus ie-tie malkonsenti, la redono de ritmoj, rimoj kaj etosoj estas perfekte sukcesa. Mi varme esperas, ke lia traduka talento permesos baldaŭan realigon de nova kaseto sub la egido de *Fonto*, kun pli taŭgaj elektoj, eventuale el la riĉa sudamerika literaturo.

Mauro Nervi (Italio)

Peco de fama mezepoka verko

Prologo (*Rakontoj de Canterbury*), de Geoffrey Chaucer (1340?-1400). El la angla trad. W.B. Johnson. Coatbridge: Kardo, 1980. 12p. 21cm. Prezo: 4,20 gld.

Plej fama kaj populara el ĉiuj literaturaĵoj de la angla mezepoko estis kaj restas la *Rakontoj de Canterbury*. Laŭ la originala koncepto de tiu ĉi verko, grupo de tridek gepilgrimantoj al Canterbury kaj reen devis sin distri per dumvojaj rakontoj. Kiam en 1400 mortis la poeto, Geoffrey Chaucer (pr. Ĝefre Ĉosa), li postlasis verkon vastan sed ankoraŭ fragmentan kaj ne finpoluritan. Inter la plej prilaboritaj partoj rangas la ĝenerala prologo al la tuta verko. Ĝi konsistas el pli ol okcent kvinjamboj, en kiuj prezentiĝas viglaj portretoj, kaj fizikaj kaj moralaj, de la rakontontoj. Riĉaj kaj mizeraj, moŝtaj kaj humilaj, piaj kaj pekaj, belaj kaj abomenindaj – ĉiuj alportas el siaj vivospertoj detalojn, per kiuj preskaŭ la tuto de mezepoka Anglio ekviviĝas. La arto de Chaucer evidentas ne nur en la vervaj priskriboj sed ankaŭ en la rakontarto. La naiva sed observema rakontanto fidele kaj ŝajn-kredeme prezentas la diraĵojn de la pilgrimantoj; samtempe, tamen, li scias reliefigi ĝuste tiujn detalojn, kiuj dementu la hipokritan ŝajnon. Pro tia nerekta prezento, la moralaj perceptoj de la poeto tiom pli frape sentiĝas.

La tradukinto celis stilon plaĉe malpezan kaj ritmon kvazaŭ salteteman. Por produkti versojn facilajn kaj internacie kompreneblajn, li ne hezitis foje oferi riĉan rimon kaj senriproĉan ritmon. Fidela la traduko ja estas, sed pli spirite ol litere. Ĉie en Chaucer traduk-kaptiloj gvatas la hodiaŭan anglalingvanon, kiu arogus kompreni senĝene kaj senstude la pratekston. Kaj ĉiam Johnson evitis enfali. Minimumo da notetoj helpas al la legantoj orientiĝi en la fora mezepoka kulturo. Espereble aliaj verkoj de Chaucer, da kiuj restas multaj konindaj, trovos tradukanton tiel simpatian kiel Johnson.

James Cool (Usono)

Kial tiom da ĵargonaĵoj?

Sociologio, ĝia historio kaj problemoj, Peter G. Forster. Liège: Someraj Universitataj Kursoj, 1976. 130p. 30cm. KT 29. Prezo: 22,50 gld.

Kio estas sociologio? Kiujn temojn esploras tiu scienco? Per kiuj metodoj? Ĉu funde ĝi estas scienco? Jen kelkaj demandoj, kies respondoj skiziĝas en tiu kurso.

La libro entenas, krom bibliografio kaj terminaro, 3 ĉapitrojn. En la unua, la aŭtoro starigas diversajn problemojn, kiujn alfrontas la disvolviĝo de la sociologia scienco. Tiu parto, la plej rimarkinda, klarigas gravajn ideojn: difinon de socio, bonan priskribon de la funkciisma teorio, fundamentan distingon inter faktoj kaj valoroj laŭ la du ĉefaj skoloj, tiu de Durkheim kaj tiu de Weber.

La dua parto, la plej longa, prezentas biografion de 10 "elektitaj klasikaj kontribuantoj al sociologio" (p. 27): interalie Karl Marx, Emile Durkheim kaj Max Weber. La studo de la unuopaj aŭtoroj sekvas la saman skemon: unue listigo de la ĉefaj verkoj, due vivo kaj intelekta ĉirkaŭaĵo, trie la tezaro, kvare la influo, kvine la kritika takso. La informoj ricevitaj ne estas pli fundaj ol tiuj de iu ajn ĝenerala enciklopedio.

La tria parto celas prezenton de "Sociologio de la religio", kun aparta konsidero pri certaj landoj: Anglio, Norda Irlando, Nederlando kaj Usono. Kial nur religio, kvazaŭ tiu estus la animo de socio kaj ĝia priskribo la alfa kaj omega de sociologio? Kaj kial nur tiuj landoj kiuj koncernas popolojn kun sama sociordo (kapitalisma), kaj religion el la sama fonto (la kristana)? Mi opinias, ke komparo inter 3 landoj (ekz. Pollando, Britio, Brazilo) kun samecaj religiaj trajtoj estus multe pli sociologie instrudona. Ankaŭ komparo inter kristanismo, islamo, budhismo rilate la opozicion tradicio/revolucio estus multe pli pensiga.

Grava trajto de la libro estas la rimarkinda svarmo de eraroj. Abundas literŝoviĝoj, mistajpoj, mistranĉoj de vortoj. La koboldo plensate petolis. Paĝo 75: "la patrino de Weber estis virino kun serioza protestanta

kreso"; mi vere ne sukcesis kapti, pri kiu salato temas! Foje la koboldo transformiĝas en veran diablon, kiam Pareto fariĝas Papeto (p. 53), aŭ kiam, rilate religion, oni volas renversi la "tedecon" (p. 88).

Alia, pli kritikenda, afero kuŝas en la elekto de la teknikaj vortoj. Mi dubas ĉu la vorto **reteno** ĝuste tradukas la Durkheim-an nocion *contrainte* aŭ *coercition*; ĝi enhavas tro da psikologia fono, kiun Durkheim certe forpuŝus; Waringhien proponas **trudo** aŭ **altrudo**. Kial ankaŭ naski tiujn filologiajn monstrojn: **gemejnŝafto** kaj **geselŝafto** por traduki la tipologion de Tönnies? Ĉu **komunumo** kaj **socio** ne sufiĉus? Kaj kion diri pri la vorto **verŝteo**, kiu pli taŭgus por doni konsilojn al kelneroj de tesalonoj? Ĉu la vorto **kompreno** ne sufiĉus? Kial tiom da ĵargonaĵoj?

Roberto Lloancy (Francio)

Du atentindaj informlibroj

Esperanto: The solution to our language problems / La solvo de niaj lingvaj problemoj. Kompilita de Rüdiger kaj Vilma Sindona Eichholz. Bailieboro (Ontario, Kanado): Esperanto Press, 1981. 472p. Ilus. 21cm. ISBN 0 919186 16 5. Prezo: 39,00 gld.

Warum Esperanto? Verschiedene Beiträge. Wien: Österreichisches Esperanto-Institut, 1981. 64p. 21cm. Prezo: 4,50 gld.

Ambaŭ verkoj havas la saman celon: informi la ĝeneralan publikon pri la lingvaj problemoj en la mondo kaj kiel Esperanto povas solvi ilin. La du libroj similas ankaŭ enhave; ili konsistas el artikoloj, eseoj kaj studaĵoj verkitaj de eminentaj movadaj aktivuloj, aŭ originale en la angla kaj germana lingvoj, aŭ tradukitaj el Esperanto. Tamen, rimarkinde diferencas la konceptado kaj aranĝo de la du informiloj.

Warum Esperanto? (Kial Esperanto?) estas presita broŝuro, kies klara litertiparo plezurigas la legadon (oni ne subtaksu tiun aspekton de informcela eldonaĵo). Antaŭparolo kaj dek unu artikoloj vastgame sed koncize prezentas la internacilingvan demandon en aktuala sociopolitika kadro. Estas pritraktita ankaŭ la psikologia rezisto kontraŭ la Internacia Lingvo kaj la maniero plivastigi la lernadon kaj uzadon de Esperanto por fine atingi oficialan agnoskon. Leganto bezonas nur unu vesperon por tralegi tiun ĉi 64-paĝan libreton kaj poste li estos sufiĉe bone informita pri la temo por decidi, ĉu valoras apogi la celojn de la Esperanto-movado kaj lerni la Internacian Lingvon. Bedaŭrinde, mankas indikoj por gvidi interesiĝintan leganton plue. Malfacile trovebla estas eĉ la adreso de la eldonisto, Aŭstria Esperanto-Instituto.

Esperanto: The solution to our language problems estas certagrade anglalingva versio de *Warum Esperanto?* ; kelkaj artikoloj estas samtemaj, sed ne okazas ripeto de identaj pecoj. Granda parto de la kompilaĵo de ges-roj Eichholz estas ĉerpita el *Memorlibro pri la Zamenhof-jaro*, publikigaĵoj de CED, kaj *Esperanto-dokumentoj*. Pluraj aperas ne nur en angla traduko; ankaŭ la originala Esperanta teksto estas presita sur la kontraŭa paĝo. Mi dubas pri la valoro de tiom da dulingvaj tekstoj en tiu ĉi speco de informilo. Oni povas legi pri la kaosa lingva situacio en internaciaj rilatoj, la eduka valoro de Esperanto, kaj la problemoj alfrontitaj de tradukistoj kaj interpretistoj. Ankaŭ tiuj ĉi legindaj kaj legendaj artikoloj estis verkitaj de fakspertaj esperantistoj. Krome, estas legaĵoj dediĉitaj al la historio de Esperanto, la biografio de ties iniciatinto, kaj literaturo en la Internacia Lingvo. La lingvoinstrua parto de tiu ĉi kompilaĵo inkludas 26-paĝan metodologie primitivan lingvokurson bazitan sur la 16 reguloj de la Fundamenta Gramatiko, kaj ne tute kontentigan klarigon pri la prononco de Esperanto. Estetike malplaĉa estas la diverseco de paĝaranĝoj kaj litertiparoj, ĉar jam publikigitaj artikoloj, anstataŭ esti rekompostitaj (kiel en *Warum Esperanto?*), estas simple fotorepresitaj. Alia misharmonia elemento estas la fotografaĵoj. Kelkaj estas tre netaj, sed la malklareco de aliaj nuligas ilian komunikvaloron. Cetere, ne ĉiuj ilustraĵoj estas celtrafaj. Kiel estas pravigebla la plenigo de ok paĝoj per bildoj de poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj?

Artikol-antologioj kiel la du recenzataj verkoj estas kritikeblaj ĝenerale pro manko de kohereco kompare kun libro verkita de unu aŭtoro, kiu trakribras la fontmaterialon kaj poste prezentas ĝin en pli unuecigita kaj harmonia formo. Kvankam la aŭtoroj de la verkoj represitaj en ambaŭ informiloj estas bone konataj al esperantistoj, ili bezonas prezentadon al la neesperantista publiko per mallongaj biografiaj notoj. Por stimuli pluan interesiĝon pri lingvaj problemoj kaj Esperanto, bona informilo devas havi bibliografion pri la plej gravaj etnolingvaj libroj kaj artikoloj tuŝantaj tiujn temojn. Inkludendaj en la enhavo estas ankaŭ informoj pri lerniloj, kursoj, periodaĵoj kaj organizaĵoj. Oni okupiĝu ankaŭ pri la ekstera aspekto de informilo. La kovrilo de la aŭstria broŝuro estas senverva; ĝi ne devas esti verda sed ĝi ja devas havi atentokaptan tipografion kun desegnaĵo aŭ fotografaĵo, prefere plurkolora. La eldonistoj eble povos efektivigi la ĉisuprajn sugestojn okaze de dua eldono.

Bernard Golden (Hungario)

En kabareda stilo

San Diego vokas. Kantas Alberta Casey. El Cajon: Berta Records, 1981. Stereofona disko. 33t/m, 30cm. FM 81021-A. Akompanas instrumenta kvaropo. 13 popularaj kantoj de diversaj aŭtoroj kaj tradukintoj. Prezo: 36,00 gld.

Jam la dua longprograma (LP?) disko de Alberta Casey. En alloga kovrilo montranta la maran flankon de San Diego. Alberta posedas ĉarman voĉon, per kiu ŝi klare prezentas la kantojn sen koncertaj afektaĵoj kiuj ĝenus la kapteblecon de la vortoj. La elekto sekvis la saman sekuran recepton de ŝia unua disko: plejparte

kanzonoj kiuj altiris internacian famon dum la pasintaj jardekoj. Tio garantias, ke multaj esperantistoj rekonos la melodiojn, kiuj pruvis sian kvaliton.

J.P. Danvy en *La kancerkliniko* pledas ke ni pli ofte aŭskultu diskojn sen insisti pri presita teksto, por pli bone kutimiĝi al aŭda kulturo. Mi provis. Certe estas malfacile, ankaŭ en naciaj lingvoj. Tio havas kvar ĝeneralajn kaŭzojn: nekutimaj ideoj komunikitaj en kanto samkiel en poemo, iom tordita esprimmaniero trudita de la metriko kaj rimo, konfuzantaj sonoj de akompanaj instrumentoj, nacia prononco de kantisto. Alberta Casey havas bonan prononcon. Nur, ŝi kelkfoje refalas al tipe usona r. La "lingua" (tiel!) kontrolanto, David Jordan, cetere ne preventis ke kelkloke aŭdeblas makuletoj kiel "ponta" anstataŭ "ponto".

Kvankam la akompananta kvarteto de piano, gitaro, kontrabaso kaj perkuto ludas profesinivele, ĝi tamen ne produktas precize dancmuzikon. La pianistino, Edith Gordon, donas klasikstilan anstataŭ ĵazan fonon. Rezulte, ĉio proksimiĝas al kabareda stilo.

Do, bona (sed iom tro multekosta) kontribuo al nia diska repertuaro.

Rob Vetter (Nederlando)

Spirita kaj anima patro de Szathmári

Vojaĝo al Faremido / Kapilario (1916, 1921), de Frigyes Karinthy (1887-1938). El la hungara trad. L. Tárkony kaj A. Szabó. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1980. 182p. 18cm. ISBN 963 571 045 3. Prezo: 13,80 gld.

Gulivero de Swift vivis en epoko, kiam ankoraŭ eblis hipotezi pri dezertaj insuloj kaj neesploritaj regionoj. La hungaro Frigyes Karinthy revivigas en nia jarcento tiun aventureman heroon, kun celoj samaj kiel tiuj de Swift: krei satiron pere de la starigo de eksterkutimaj vidpunktoj. Temas pri tio, kion plenumas la plej bona sciencfikcio: ĝi iel "fremdigas" al ni mem nian propran realecon kaj tiel primeditigas. Sed nur nekuracebla revulo kapablus nun kredi, ke sur la tero plu ekzistas nekonataj popoloj kaj moroj: ĉar al Gulivero nia samtempano ne eblas "horizontalaj" malkovroj, jen li finfine malkaŝas al ni la sekretojn de la supro kaj malsupro kaj de tieaj enloĝantoj. En la ĉielo, super la nuboj, troviĝas Faremido, lando de nekreitaj maŝinoj, kiuj parolas lingvon similan al tiu Solresol, kiu paradas inter la antaŭuloj de Esperanto. Gulivero estas tre identiĝema ulo, do li bone kapablas priskribi la sintenon de la Faremid-anoj al la homa raso. Tre simple: ni estas malsano; kompare kun la rezistemo kaj forteco de la metaloj, la homa vivo aperas mallonga, senutila, putranta proceso.

Lastatempe oni pli kaj pli legas en sciencpopularigaj artikoloj, ke se ja veras ke la homaro devenas de la simiaro, ankaŭ probablas ke la viro kaj virino devenas de respektive malsamaj simioj. La vojaĝo al la malsupro, al Kapilario, donas la okazon por tiaspecaj meditadoj. En la fundo de la maroj belegaj virinoj kun travidebla haŭto enkorpigas ĉiujn difektojn de la virino, kiajn la literatura tradicio heredigas. Ja ekzistas viroj en tiu fora malseka lando, sed ili estas reduktitaj al siaj bazaj funkcioj.

Satiro, utopio, imagitaj socisistemoj: jen konsisto kaj celo de la rakontoj de la ĉiamaj Guliveroj, ankaŭ ĉe nia Szathmári. Pri Karinthy li diris: "Mi rigardis lin mia spirita, anima patro. Li estis la unusola hungara verkisto, kiu ne rakontis, sed prezentis kaj kritikis la realaĵon. Li estis la unua homo, kiu tute komprenis la Kazohinion". La legado de ĉi tiu libro, kiun riĉigas atentinda postparolo de Vilmos Benczik, do estas ne nur interesa kaj agrabla en si mem: ĝi ankaŭ donas la eblecon pliprofundigi nian originalan literatursciencon.

Giulio Cappa (Italio)

Enhavo jes, aranĝo ne!

25 jaroj; Antologio de Belartaj Konkursoj. Redaktis William Auld (poezio) kaj Vilmos Benczik (prozo). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1977. 207p. Ilus. de Gerő Bottos. 19cm. ISBN 963 571 005 4. Prezo: 13,80 gld.

Ne dubu pri tio, ke estas pli bone havi ĉi tiun libron ol ne havi ĝin. Ĝi kolektas 36 originalajn poemojn, 7 tradukitajn poemojn kaj 11 originalajn novelojn, kaj la fakto, ke ĉiu peco gajnis premion en Belartaj Konkursoj (nu, laŭdan mencion ĉe unu el la noveloj) garantias relative altan nivelon.

En la elekto de originalaj poemoj, Auld evidente decidis reprezenti ĉiun gajninton de unua, dua aŭ tria premio per unu verko. Almenaŭ por la unuaj 24 jaroj validas tiu principo: ial mankas Stojan Ĝuĝev kaj Zora Heide, kiuj gajnis en 1975. La aranĝo de la poemoj

Se vi mendas librojn ĉe UEA, pensu pri la sendokostoj: minimume 5,00 guldenoj; por mendoj sub 200 gld. 20 procentoj, por tiuj super 200 gld. 10 procentoj. Nederlandanoj memoru la imposton: por libroj 4, por aliaĵoj 18 procentoj. Dankon!

estas meĥanika, apenaŭ utila: alfabete laŭ aŭtoro. Kronologia aranĝo ebligus kompari, ekzemple, "Nokta paŝo" de Vincenzo Musella kaj "Nokto en ĝardeno" de Boĵidar Vančik kun "Anna" de William Auld. La unuaj du dividis unuan premion ĝuste en la unua jaro de BK (1951, kvankam la libro erare asignas la poemon de Vančik al 1952), venkante la nun multe pli konatan "Anna", kiu gajnis duan. Ĉu pravis la tiama juĝo, la leganto decidu.

Bedaŭrindas la malmulteco de poemtradukoj, kiuj meritus apartan antologion. Precipe kun "Parolas maljunulo" de Erich Kästner, elgermanigita de Horst Michling, mi ĝojis konatiĝi.

El la noveloj, ĉiuj estas ĝueblaj, kvankam kelkaj humuraĵoj embarasetas per sia eksmodeco. Iuj aŭtoroj, kiel Marjorie Boulton kaj Endre Tóth, montras metiecan kompetenton, sed literature elstaras nur "Unua morto" de Sen Rodin, kies novelaron antaŭ jaroj anoncis la malnova Stafeto sed neniam aperigis.

Al tia jubilea volumo konvenus multe pli da fonaj kaj historiaj informoj, ol Baldur Ragnarsson, nuna prezidanto de la juĝkomisiono de la Belartaj Konkursoj, donas en sia tripaĝa postparolo. Al la verkoj mem kaj iliaj aŭtoroj li dediĉas entute unu sesdekvortan alineon! Ĉu la prezo de la libro multe altiĝus, se aldoniĝus 25 paĝoj por simple listigi la premiitajn verkojn de kvarona jarcento? Ragnarsson mencias la branĉojn tradukita prozo kaj tradukita teatraĵo, kvazaŭ ili estus kutimaj (kiel ili devus, aŭ devintus, esti, laŭ la tiama Regularo de BK), neglektante mencii, ke oni efektive akceptis konkursaĵojn por tiuj branĉoj en nur du jaroj, 1952 kaj 1975. Necesas eĉ iom zorge legi por sciiĝi, ke la "25 jaroj" de la titolo estas 1951-1975.

La krudaj desegnaĵoj de Gerő Bottos, kiuj ne ŝajnas rilati al sia apuda teksto, eble plaĉos al iuj. La preso plurloke kapablus plaĉi al neniu. Volumo, do, kiu tre indas aĉeton pro sia enhavo – sed kiu, rilate la redakton, meritas eĉ ne "laŭdan mencion".

Charles R.L. Power (Usono)

Japana verkaro de rusa esperantisto

Malvasta kaĝo, de V. Eroŝenko (1890 - 1952). Kompilis Y. Mine. El la japana trad. M. Miyamoto. Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo. 1981. 87p. 18cm. Prezo: 14,10 gld.

La verkaro de Vasilij Eroŝenko (mi preferas: Jeroŝenko) apartenas samtempe al tri literaturoj: rusa, japana kaj Esperanta. Notindas, ke dum la lastaj jaroj denove kreskas intereso pri li: en Soveta Unio aperis kelkaj libroj de li kaj pri li; en Japanio unu post alia aperis tri liaj libretoj: *Lumo kaj ombro*, *La tundro ĝemas* kaj fine *Malvasta kaĝo*.

La lasta estas tradukoj el la japana fare de Miyamoto, kiu penis uzi tian lingvaĵon, kiun uzus, laŭ lia opinio, Eroŝenko mem, se tiu verkus la pecojn rekte en Esperanto. Post antaŭparolo kaj "Vortoj de la aŭtoro" sekvas "Malvasta kaĝo" (bela fabelo pri aspiro al libero), "Fiŝoj malĝojas" (kun iom moderna konkludo pri protekto de la naturo), "Apud marĉo" (gloriganta aŭdacon), "Lando de ĉielarko" (revo pri pli bona mondo). Krome aperas la bahaa klasikaĵo "Kaŝitaj vortoj", kiun Eroŝenko tradukis en Esperanton el la angla.

V. Eroŝenko ne bezonas specialan prezenton por esperantistoj, inter kiuj lia romantika verkaro estas tre ŝatata. Aliflanke, la tradukinto prave plendas: Esperanta literatura kritiko, same kiel antologioj, pli-malpli ignoras la verkiston. Ni notu ankaŭ, ke la eksterordinara vivo de tiu homo superas fantazion. Liaj verkoj estas ekzotika koktelo, en kiu reflektiĝas lia personeco de rusa esperantisto, rigardanta la mondon tra japana prismo, de blinda, simplanima, kuraĝa, sciavida, honesta homo.

Boris Kolker (Soveta Unio)

La tundro ĝemas; El la vivo de ĉukĉoj, de V. Eroŝenko (1890 - 1952). Kompilis Y. Mine. Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1980. 83p. Mapoj. 18cm. Prezo: 10,50 gld.

Vasilij Eroŝenko, blinda rusa instruisto multe vojaĝinta, pasigis multajn aventurajn monatojn en 1928/29 inter la ĉukĉoj, popolo de arkta Siberio, por studi la vivokondiĉojn de la tieaj blinduloj. Liaj skizoj pri tiu rimarkinda mongola tribo en la plej foraj tundroj de la grandega Siberio estas interesaj, instruaj kaj certe ĉarmaj. Multaj notoj klarigas la tekston; krome estas priskribo de la eksterordinara vivo de Eroŝenko, kiu blindiĝis, 4-jara, pro infekta febro (morbilo). Kiel junulo li fariĝis esperantisto kaj de post tiu tempo vagadis tra Eŭropo kaj Azio ĝis 1952, kiam li mortis.

W. Krikke (Nederlando)

Ĉi tiu revuo principe recenzas ĉiujn pli gravajn librojn en aŭ pri Esperanto, kondiĉe ke oni al la redakcia adreso sendas du senpagajn ekzemplerojn de la nova libro. Nepetitaj recenzoj ne aperas. La redakcio elektas la recenzantojn.

Laste aperis . . .

Amuzaj dialogoj (1973), Albert Lienhardt. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1981. 2+173p. 18cm. La konata dialogaro, kun paralela teksto en la ĉina. Prezo: 7,50 gld.

Argentina novelaro (tria serio). Red. kaj el la hispana tr. Enio Hugo Garrote. Laroque Timbaut: Broŝurservo de SAT, 1982. 47p. Mimeo. 21cm. Ses noveloj, i.a. "La sudo" kaj "La mortinto" de J.L. Borges. Prezo: 2,70 gld.

Ĉu vi parolas Esperante? (1969), Andrzej Pettyn (1937-). Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1981. 8+125p. 18cm. Moderna kaj sprita dialogaro. Paralela teksto ĉinlingva. Prezo: 4,80 gld.

Didaĥeo, La. El la helena tr. Gerrit Berveling. Ravenna: IABO, 1979. 14p. 21cm. Serio de IABO 4. Kompendio pri kristana eklezia vivo el la unua jarcento. Prezo: 2,10 gld.

Elektitaj satiroj, Efraim Kišon (1924-). El la hebrea tr. Gerhard Ziegler. Gerlingen-Stuttgart: Bleicher-Eldonejo, 1981. 111p. 19cm. ISBN 3 88350 502 1. Tridek skizoj de la mondfama israela humuristo. Prezo: 16,80 gld.

El verkoj de E. Lanti (ps. de Eugène Adam, 1870-1947), vol. 1. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1982. 158p. Mimeo. 21cm. VL1.15. "Adamaĵoj", "Absolutismo", "Herezaĵo" kaj kelkaj leteroj de la disvolvinto de la sennaciismo. Prezo: 8,10 gld.

El verkoj de E. Lanti (ps. de Eugène Adam, 1870-1947), vol. 2. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1982. 139p. Mimeo. 21cm. VL2.15. "Tri semajnojn en Rusio", diversaj artikoloj kaj leteroj, kaj la recenzo "Tro plena gramatiko". Prezo: 8,10 gld.

Esperanta lernolibro. Kompilis Ĉina Esperanto-Ligo. Beijing: El Popola Ĉinio, 1981. 12+425p. 19cm. 9-Es-1559P. Kompleta lernolibro por ĉinoj, kun ampleksaj legaĵoj. Prezo: 15,00 gld.

Esperanto: Jezik i pokret; A, Rašić, Štimec, Tišljar. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1981. 56p. 13cm. Informilo en la serbokroata / kroatserba lingvo. Prezo: 3,60 gld.

Evangelio kopta laŭ Tomaso, La. El la kopta tr. Gerrit Berveling. Ravenna: IABO, 1981. 20p. 21cm. Serio de IABO 5. Apokrifa verko el la kvara jarcento. Prezo: 2,10 gld.

Fragmentoj el la revuo "Soveta Uzbekistano". El la uzbeka. Taŝkento: Uzbeka Asocio de Amikeco kun Eksterlando, 1981. 44p. Mimeo. 20cm. Artikolaro pri progreso en la hodiaŭa soveta respubliko Uzbekistano. Prezo: 1,80 gld.

Grammatik; I Das Wort; Sprach-Tafel 1. Elmstein: Esperanto Verlag Palatina, 1980. 11p. sur faldita kartono. 20cm. ISBN 3 922682 00 6. Resumo de la reguloj de Esperanta vortformado. Trikolora preso. Prezo: 5,70 gld.

Historio kaj la ideo de lingvo internacia, La, Kozo Futatsugi. Mainiĉi Ŝimbun, 1981. 262p. 19cm. Japanlingva. Prezo: 21,90 gld.

Imenlago, Theodor Storm. El la germana tr. (1907) Alfred Bader. Beijing: El Popola Ĉinio, 1981. 49p. 18cm. 10-Es-1558P. Sentimentala amrakonto. Ĉinlingve prinotita de Ilin. Prezo: 1,80 gld.

Infanpsikologio; Elektitaj temoj, Margrete Landmark (1916–). Liège: Someraj Universitataj Kursoj, 1978. 10+188p. 30cm. La hereda bazo, la komenco de persona vivo, la infano kiel socia kunulo ktp. Prezo: 22,50 gld.

Junulara kantareto, 3a kajero. Red. Josef Cink. Šumperk: Esperanta klubo, 1980. 48p. 20cm. 46 kantoj, kun muziknotoj. Prezo: 3,30 gld.

Kanto de juneco, unua parto, Yang Mo (1914-). El la ĉina tr. Yang Yongsen. Beijing: El Popola Ĉinio, 1981. 5+303p.+mapo. Ilus. de Hou Yimin. 19cm. 10-Es-605PA. Romano tre populara en Ĉinio, pri juna intelektulino en la epoko de la kontraŭjapana milito. Prezo: 9,00 gld.

Kio estas Esperanto? Beijing: Ĉina Esperanto-Ligo, 1981. 66p. 18cm. Ĉinlingva informilo. Prezo: 2,40 gld.

Konduto de grandsinjoro Tadanao, La / Balotado, Kan Kikuĉi (1888-1948). El la japana tr. Ŝiger Ujeki. Tokio: Zamenhof-Klubo, 1981. 75+6p. 18cm. Du noveloj, la unua pri feŭdaj konfliktoj en la epoko de ŝoguno Ijejasu, la alia pri kontraŭregistara bando de la pasinta jarcento. Prezo: 15,60 gld.

Libro, kiu diras la veron, La (1974), Claude Vorilhon "Rael" (1946-). El la franca tr. Jean-Pierre Raimbault. Rennes, 1981. 146p. Ilus. de la aŭtoro. 21cm. Pri renkontiĝo kun eksterteranoj kaj ilia klarigo pri la okazaĵoj de la Biblio. Prezo: 23,40 gld.

Międzynarodowa komunikacja językowa; Materiały poseminaryjne. Red. Tadeusz Ejsmont. Łódź: Uniwersytet Łódzki, 1981. 184p. Mimeo. 24cm. 14 referaĵoj, en la pola, de seminario pri internacia lingva komunikado. Prezo: 12,00 gld.

Morto kaj la kuracisto, La, Jenő Heltai (1871-?). El la hungara tr. Ladislao Somlai. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1981. 17p. 20cm. ISBN 963 571 090 9. Fantazia novelo, kun paralelaj hungara originalo kaj Esperanta traduko. Prezo: 1,80 gld.

Novelaro, Grgur Karlovčan (1913-1942). El la kroata tr. Josip Pleadin. Zagreb: Esperanto-klubo "Koko", 1981. 37p. 20cm. Ok noveloj kaj skizoj pri kamparana vivo. Prezo: 3,90 gld.

Per kanto al Esperanto. Red. Wojciech Tomaszewski kaj Wiesław Tomaszewski. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1980. 126p. 21cm. 56 kantoj, Esperantaj, polaj kaj diversnaciaj, kun muziknotoj. Prezo: 9,00 gld.

Progresiga kurso, William Auld (1924-). Brasília: 66a UK de Esperanto, 1981. 11p. 22cm. Notoj kaj ekzercoj. Prezo: 1,80 gld.

Regulus, Lorjak (ps. de J. Mahé). Ascoli Piceno: Gabrielli, 1981. 340p. 20cm. Beletra Eldon-Serio 16. Ekscita romano pri Parizo de la 17a jarcento. Prezo: 32,40 gld.

Unua Simpozio pri Komputiko. Red. C. Bertin. Rennes, 1981. 269p. 30cm. 19 referaĵoj, reproduktitaj laŭ tajpitaj manuskriptoj. Prezo: 33,00 gld.

Vibraj momentoj; 12 skizoj kun studmaterialo, Johan Hammond Rosbach (1921-). Oslo: Esperantoforlaget A/S, 1981. 83p. Ilus. de Helge B. Skånlund. 24cm. Progresiga legolibro de konata Esperanta novelisto. Prezo: 16,80 gld.

Vizaĝoj, Ivo Andrić (1892-1975). El la serba tr. Roger Imbert. Sarajevo: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1981. 61p. 17cm. Ok noveloj de nobelpremiita verkisto. Prezo: 6,60 gld.

Zeg, luister eens; Poëzie in vertaling. Red. Tymen Trolsky. Hilvarenbeek: Stichting J.H. Leopold, s.j. (1981). 211p. 20cm. Poemoj el diversaj lingvoj tradukitaj en la nederlandan, inkluzive de 16 Esperantaj (de Kalocsay, Auld, Ragnarsson kaj E. de Kock). Tradukis W.A. Verloren van Themaat. Prezo: 18,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18 procentoj por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20 procentoj, por la mendoj super 200 guldenoj – 10 procentoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Esperanta poŝkalendaro

Kiel pasintjare, sed nun pli riĉe kaj pli amplekse, la internacia magazino *Monato* denove eldonis sian **poŝkalendaron "La jaro 1982"**. Sur ĝiaj 160 paĝoj (10,5x15cm) troviĝas tuta amaso da informoj plej diversspecaj kaj utilaj. Interalie, enestas la Fundamento de Esperanto, vortareto Esperanta-hungara-franca-svahila, tiel multe da mapoj, ke ĝi fariĝas preskaŭ nova poŝatlaso en Esperanto. Kompreneble, ne mankas ankaŭ amaso da gravaj datoj kaj spaco por propraj notoj. La abonantoj de *Monato* ricevas ĝin senpage. Aliaj interesitoj mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 9,30 (por Nederlando 9,67) gld., plus sendokostoj.

TEJO-paĝo

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave., London, Britio, W11 4UF.

38a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO de TEJO, 1982 07 31 – 08 07, Leuven (Belgio)
Adreso: 38a IJK, Duisburgsestraat 12,
B-3030 Leuven-Heverlee, Belgio

IJK iras al fama universitata urbo

OKAZAS ĜUSTAJ kaj malĝustaj elektoj de la kongresaj urboj. Tio ne malpli rilatas la Universalajn Kongresojn ol tiujn de TEJO. La ĝustaj elektoj estas tiuj, kiuj kondukas la koncernan kongreson en la urbon kaj landon en kiu tia manifestacio estos rimarkita, en kiu ĝi ion signifos el la informa vidpunkto, en kiu ĝi stimulos la lokan Esperanto-agadon. Ni nun ne eniru la demandon, kiuj kongresurboj de TEJO en la lasta jardeko estis la ĝustaj kaj kiuj estis miselekto. Ekzamenu tion mem foje! Klopodu tion fari senpartie, neŭtrale, kio signifas, ke vi provu forgesi, kiel bele vi amuziĝis aŭ enamiĝis dum unu el tiuj kongresoj.

Ĉiukaze Loveno estas la ĝusta elekto por la 38a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Kiel ni kuraĝas diri tion jam nun, ok monatojn antaŭ la Kongreso? Nu, Loveno havas 20 000 studentojn kaj jam tio pruvas la ĝustecon de la elekto. Jen iom da historio:

Loveno, kiun la tiea flandra plimulto nomas Leuven, la valona (franclingva) malplimulto Louvain, iam ĉefis inter la urboj de la belga provinco Brabanto, antaŭ ol Bruselo fariĝis la registara sidejo de Belgio. Historian gravecon ĝi havas pro sangaj konfliktoj inter nobeloj kaj burĝoj en la 14a jarcento. Venkis la nobeloj, el kio profitis la ekonomio de Anglujo, kien fuĝis la lovenaj teksistoj.

La nuntempa famo de Loveno ŝuldiĝas al la universitato, kiun en 1426 kunfondis duko Johano Kvara de Brabanto kaj papo Marteno Kvina. Precipe la teologia fakultato ĝuas mondan reputacion. Konata estas ankaŭ ĝia biblioteko, malgraŭ ke ĝi estis neniigita dum ambaŭ mondmilitoj.

Tiuj, kiuj al la TEJO-kongresoj iras ĉefe por amuziĝo, (spite la akuzojn el nia enkonduka alineo) sciu, ke en Loveno troviĝas la plej granda bierfarejo de Belgio, kiu siavice apartenas al la plej grandaj konsumantoj de tiu flava, gajiga likvaĵo.

Eble la apuda bildo almenaŭ iom pravigas la aserton de la unua informilo pri la 38a IJK, ke Loveno estas "vera subĉiela arkitektura muzeo". Pluraj malnovaj preĝejoj, precipe tiu de Sankta Petro, la gotika urbodomo kaj la iama beginejo (monaĥina kvartalo) forte apogas tiun aserton.

Belgio ĝenerale, kaj Loveno aparte, havas kalendaron kiu plenplenas je festoj. En Loveno pli-malpli ĉiutage, precipe dum la someraj monatoj, okazas almenaŭ kelkaj stratfestoj, en kiuj ne mankas parto de la multnombra studentaro, kiu pro la famo de la universitato estas en si mem bunta kaj tre internacia laŭ la konsisto.

Kiel vi eble jam scias, la temo de la 38a IJK estas la rilato inter la scienco kaj la socio. La organizantoj ankoraŭ kunmetas la programon kaj ne estas malfrue anonci sin, se ne mankas emo kaj kapablo.

Ĝis la 30a de aprilo 1982, la IJK-kotizoj estas: por homoj ĝis inkl. 20-jaraj, 230 gld. (210 gld. ĝis la 15a de januaro); 21–25-jaraj, 260 (230) gld.; 26–33-jaraj, 300 (270) gld.; pli aĝaj, 330 (300) gld. Por individuaj membroj de TEJO (t.e. tiuj, kiuj ricevas almenaŭ la Jarlibron de UEA), estas rabato de 30 guldenoj. La kotizo inkluzivas loĝadon en dupersona ĉambro kaj tri manĝojn tage, kiel ankaŭ, kompreneble, la tutan kongresan programon, inkluzive de ekskurso. Eblas aliĝi sen loĝado kaj manĝoj, kaj ricevi rabaton pro tio de 150 guldenoj.

Loveno, malnova kaj mondfama universitata urbo, gastigos la 38an TEJO-kongreson en 1982.

Nekrologoj

ROKSANO MANUSU forpasis la 10an de oktobro 1981 en la greka ĉefurbo Ateno. Ŝi estis filino de la fama greka Esperanto-pioniro, d-ro Anakreono Stamatiadis. Fakte, ŝi mem iĝis pioniro de la greka Esperanto-movado, kiun ŝi gvidis dum duona jarcento, i.a. kiel prezidanto de Helena Esperanto-Asocio dum pluraj jardekoj. Kvankam laŭ sia propra volo ekster la oficiala listo de la organizintoj, ŝi ludis gvidan rolon ankaŭ en la preparoj por la sukcesa 61a Universala Kongreso en 1976 en Ateno. S-ino Manusu vivolonge estis malavara mecenato de la greka E-movado.

EMILY APINE-GRUNDSTEINS (1910-1981), kiu servis dum kelkaj jaroj kiel delegito de Victoria (Kanado), forpasis ĉi-jare.

ROBERTO DAS NEVES (1897-1981), verkisto kaj ĵurnalisto, forpasis antaŭ nelonge en Rio-de-Ĵanejro. Prof. Das Neves naskiĝis en Portugalio sed antaŭ multaj jardekoj elmigris al Brazilo, kie li estis unu el la pioniroj en la disvastigo kaj studado de Esperanto.

HUBERTO ROHDEN (1894-1981), en Brazilo vaste konata verkisto religia, forpasis la 7an de oktobro. Pluraj liaj verkoj, i.a. pri Gandhi kaj Einstein, estas eldonitaj ankaŭ en Esperanto.

JOSEP VENTURA I FREIXAS (1893-1981), laika frato benediktana, tradukinto (1967) de la ampleksa kataluna romano *Soleco*, mortis la 14an de novembro.

HILLAR SAHA (SAKARIA) (1899-1981), aktiva en la estona E-movado ekde 1919, fondinto de Estona Esperanto-Instituto, mortis en Tallinn la 12an de novembro. En 1932 aperis lia *Enkonduko en la pedagogion.*

Loke

Bulgario

• Esperanto ĉi-jare fariĝis fakultativa studobjekto por la 9a klaso en ĉiuj bulgaraj mezlernejoj. Necesas nun trejni sufiĉe da instruistoj por kontentigi la bezonojn, kiujn kreas tiu grava atingo. Bonŝance ĉi-somere malfermiĝis la longe preparita Internacia Esperanto-Kursejo, pitoreske situanta en Pisanica (Rodopa Montaro), kies programo enhavas ankaŭ metodikajn kursojn por instruistoj.

Hinda Unio

• Tritagan kongreson, de la 5a ĝis la 7a de februaro ĉi-jare, en Vijayawada planas la Hinda Unio Esperanto-Asocio. La okcident-bengala gazeto *Nabadwip Barta* aperigis lecionojn pri Esperanto kaj artikolon pri la kongreso en pluraj lastatempaj numeroj. Ĝia korespondanto en Kalkato estas la prezidanto de la Asocio, s-ro Swaraj Chakravarty. Aliĝontoj sin turnu al: s-ro P.V. Ranga Nayakulu, Gandhinagar, Vijayawada-520003. La kosto de la kongreso, inkluzive de manĝoj kaj loĝigo, estas 20 rupioj.

Tajlando

• En Bankoko, kie la Tajlanda Esperanto-Instituto fondiĝis pasintjare, s-ro Marcel Perray nun instruas Esperanton al dek lernantoj. S-ro Perray, kiu jam dekon da jaroj loĝas en Tajlando, esperas viziti Eŭropon kaj la Centran Oficejon ĉi-jare.

Pakistano

• La lastatempaj viglaj klopodoj de la 24-jara s-ro Saeed Ahmad Farani, bankisto en Jhelum, rezultigis aron da urduaj kaj anglalingvaj artikoloj kaj bildoj en naciaj, pakistanaj ĵurnaloj. Lia instruado de la lingvo rikoltis ŝajne ankaŭ plurajn novajn membrojn por PAKESA (Pakistana Esperanto-Asocio), kies Informa Centro lastatempe sendis al ni la nomojn de 16 novaj anoj.

Evolulandoj

• Laŭ informo en *Budapeŝta informilo*, multaj lerniloj estas bezonataj en la sudorienta Azio. En Vjetnamio s-ro Nguyen Dô Kahn (173-A, Vo-van-Tân-quân 3, T.P. Ho Chi Minh) petas materialon por desegnado kaj pentrado por Esperanto-kurso en infana domo en Hanojo; en Kampuĉio s-ro Navouth (Ministère de l'Education Nationale, Pnom-Penh) serĉas Esperanto-vortarojn en la kamboĝa, franca kaj angla lingvoj, plus lernolibrojn kaj informilojn en la franca, angla, rusa kaj germana lingvoj; en Laoso s-ro Waterinsak (Ministère des Affaires Etrangères, Vientiane) petas lernolibrojn, informilojn, Esperantaĵojn k.s. en la franca, angla, rusa kaj germana lingvoj.

Islando

• La ĵurnalo *Tjodviljinn* en sia numero de la 20a de septembro aperigis ampleksan intervjuon kun Baldur Ragnarsson, vicprezidanto de UEA. La intervjuo traktis i.a. la 66an UK en Brazilio, la celojn de UEA kaj la nuntempajn perspektivojn de Esperanto.

• Jugoslavio: Dum la pasinta lerneja jaro, en Pirot la Internacia Lingvo estis regule instruata al 180 gelernantoj de la bazaj lernejoj en tiu urbo proksima al la landlimo inter Jugoslavio kaj Bulgario. Sur la foto estas grupeto da gelernantoj kun la plej agema kaj plej malnova loka E-aktivulo, s-ro Jovan Pavlović.

Instruistoj

• Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazigos sian 16an Internacian Konferencon de la 15a ĝis la 24a de julio 1982, en Seiano di Vico Equense, proksime al Napolo, Italio. Aliĝilo kaj provizora programo estas haveblaj ĉe s-ro Rolando Incoronato Pia, via Panoramica 63, I-80056 Ercolano, Italio.

Pentroarto

• La internacie konata pentristo Hugo Landheer, kies verkoj en decembro ekspoziciiĝis en la Nord-Holanda Domo en Haarlem (Nederlando) okaze de lia 85-jara datreveno, ĵus donacis kvindekon da pentraĵoj al la Esperanto-Muzeo en Szeged (Hungario). Ilin ekspozicios unue kulturcentro proksime al Budapeŝto.

Virinoj

• Kiel konate, la gazeto *Sekso kaj egaleco* aperas ne nur en Esperanto sed ankaŭ en japana traduko. La gazeto dissendis al siaj abonantoj demandaron pri la virina vivo, helpe al la granda japana ĵurnalo *Mainiĉi ŝimbun*, kiu sekve de tio, en sia numero de la 25a de septembro, aperigis (en japana traduko) komentojn de esperantistinoj el dek eŭropaj landoj.

Scienco kaj tekniko

• "Energio – la tutmonda problemo" formos la temon de la tria en tiu jam renoma serio de sciencaj aranĝoj, SAEST (Seminario pri Apliko de Esperanto en la Scienco kaj Tekniko). Kiel kutime, la dua parto de la Seminario estos dediĉita al terminologia laboro. Aliĝiloj kaj instrukcioj pri preparado de referaĵoj estas haveblaj ĉe Čeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-110 01 Praha 1, Čeĥoslovakio. SAEST 82 okazos en la sudbohemia urbo České Budejovice de la 13a ĝis la 15a de aŭgusto 1982.

Terminaroj

• *Biblia revuo*, trimonata periodaĵo de Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj, jam de pluraj jaroj, iom post iom, kompletigas tre ampleksan terminaron sub la titolo "Biblia vortaro". Ekde la mezo de 1975 en *Biblia revuo* regule aperas paĝoj de la "iam kompletigota plena biblia vortaro". La paĝoj estas tiel kompostitaj kaj numeritaj, ke ili poste facile kunmetiĝos en terminaron de pluraj centoj da paĝoj. En la ĵus aperinta revunumero 2/1981, la "Biblia vortaro" atingis alfabete la kapvorton "medoj", kio supozigas, ke almenaŭ duono de la vortaro jam estas kompostita. La abono de *Biblia revuo* kostas 15,00 gld. kaj estas mendebla ĉe UEA.

Skoltoj

• Laŭ *Norvega esperantisto*, n-ro 5/81, en la granda tendaro de geskoltoj (pli ol 18 000 partoprenantoj), okazinta komence de aŭgusto 1981 en Norvegio, disvolviĝis multa aktiveco pri Esperanto. La Internacia Lingvo estis elektebla kiel unu el 30 agadoj. Pli ol mil geskoltoj vizitis Esperanto-standojn kaj ĉ. 3 000 vidis apartan E-ekspozicion. Tiuj klopodoj de John Berggreen kaj 12 helpantoj rezultigis poste mendon de 526 libroj kaj 187 aliaj Esperantaj presaĵoj.

Lingvistiko

• En 1982 la revuo de CED *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado* lanĉos novan rubrikon, "Terminologio", cele al la normigo, i.a. en Esperanto, de gentonomoj, lingvonomoj kaj fakaj terminoj lingvistikaj kaj lingvo-planadaj. La redaktoro, d-ro Richard E. Wood (Dept. of English, Southeast Missouri State University, Cape Girardeau MO 63701, Usono), petas tiukampajn kontribuaĵojn. La trionjara, ĉefe anglalingva revuo (kun Esperantaj resumoj) estas abonebla ĉe la Libroservo de UEA (por individuoj 40,00 gld.; por institucioj, 64,00 gld. jare).

Jubileoj

• Dum ni aliradas la centjaran datrevenon de la Internacia Lingvo, kelkaj niaj institucioj celebras propran jubileon. La 1-an de decembro 1981, Klubo Esperantista en Oslo (Norvegio) festis sian 75-jariĝon, kaj du semajnojn poste, ĝuste en la Zamenhof-tago, alia skandinava grupo, Esperanto-Societo de Uppsala (Svedio), celebris naŭ jardekojn da ekzisto. Inter la fruaj upsalaj iniciatoj elstaras la literatura revuo *Lingvo Internacia*, fondita de P. Nylén kaj V. Langlet en 1895.

Sporto

• Por helpi al geesperantistoj, kiuj venos meze de 1982 spekti en Hispanio la Mondan Futbalan Ĉampionecon, Barcelona Esperanto-Centro ĵus fondis apartan informoficejon. Oni jam povas kontakti ĝin skribe aŭ telefone, uzante jenan adreson: Informoficejo M-82, Carreras Candi 34, Barcelona 28, Hispanio. Telefono: (34 3) 240 26 62.

• Internacian simpozion pri "La sporto en la moderna socio", inter la 7a kaj 11a de julio 1982 en Madrido, organizas Madrida Esperanto-Liceo, Atocha 98, 4°, Madrid 12, Hispanio. Telefono: (34 1) 230 87 98. La simpozion aŭspicias UEA.

• S-ro Ray Ross, UEA-delegito en Brisbane (Aŭstralio), estas membro de la loka organiza komitato de la Ludoj de Brita Komunumo. Tiu granda sporta konkurso okazos inter la 30a de septembro kaj la 9a de oktobro 1982. Se esperantistoj intencas ĉeesti tiun manifestacion, ili nepre skribu al: R. Ross, 41 Agnes St., Sunnybank, Queensland 4109, Aŭstralio. Telefono (61 4) 345 24 02.

Bindilo por teni ordon

SE VI JAM NE KUTIMAS AĈETI BINDITAN JARKOLEKTON DE NIA REVUO (20,00 gld., plus la sendokostoj), KIAL VI ANKORAŬ NE MALKOVRIS LA EKZISTON DE ALIA SOLVO POR TENI ORDON EN VIA KOLEKTO DE LA NUMEROJ DE ĈI TIU REVUO? IDEO:

Bela bindilo el malhelruĝa kvazaŭleda plasto por teni en bona ordo la 11 ĉi-jarajn numerojn de nia revuo kostas 9,00 (por Nederlando 10,62) guldenojn, plus sendokostoj. Mendu de la Libroservo de UEA, Nw Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Persone



Michiewicz-Sakaguchi

• La 16an de oktobro 1981 doktoriĝis en la Universitato ELTE en Budapeŝto Alicja Michiewicz-Sakaguchi. La temo de ŝia disertacio estis: "La lingva modeligo en fremdlingva instruado kaj en interlingvistiko". Tio estis la tria doktoriĝo en Budapeŝto pri interlingvistika-esperantologia temo. La unua estis tiu de Mária Rózsa Szabó-Mátá (pri la semantika modeligo de la filozofiaj lingvoj), la dua de Judit Balógh (pri Esperanto kiel pontolingvo en la instruado de fremdaj lingvoj). **Sur la supra foto:** A. Michiewicz-Sakaguchi antaŭ la ekzamenkomisiono (de maldekstre): prof. J. Zsilka, prof. J. Balázs (prezidanto), prof. I. Szerdahelyi (temgvidanto) kaj prof. E. Simon.

Egami

• Prof. Fujio Egami, mondfama biokemiisto, prezidanto de la Internacia Societo por la Studo de la Originoj de la Vivo, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, fariĝis 70-jara la 21an de novembro 1980. Okaze de tiu jubileo, fine de 1981 aperis 454-paĝa festlibro *Science and Scientists* (Scienco kaj sciencistoj), al kiu kontribuis 56 sciencistoj el la tuta mondo. Ĉefe temas pri eseoj de renomaj biokemiistoj, biologoj kaj kemiistoj. Inter la kontribuintoj troviĝas tri aliaj esperantistoj: d-ro Paul Neergaard (ankaŭ membro de la Honora Patrona Komitato) kaj d-roj Ralph A. Lewin kaj David K. Jordan. La du lastaj verkis la eseon "La superrego de la angla kaj la potenciala uzo de Esperanto por la resumoj de sciencaj artikoloj". La festlibron eldonis la Japana Scienca Societo (ISBN 4 7622 0293 2).

Brennan kaj Power

• Anna Brennan, kiu dum la lastaj kvar jaroj laboris en la CO de UEA, forlasis la oficon komence de oktobro. Ŝi estis redaktoro de la Jarlibro, prizorgis la bultenojn de Internacia Gazetara Servo kaj faris multajn aliajn taskojn. Aparte konata ŝi estas kiel aktivulo en la virina movado kaj redaktoro de la bulteno *Sekso kaj egaleco*. Pri tio ŝi ankaŭ estonte okupiĝos en sia nova loĝloko Romo. Alia oficisto de UEA, Charles R.L. Power, reiros en januaro al Usono (adreso: 1014 Weymouth Ave., San Pedro CA 90732). Power estis ĉe UEA ekde marto 1977, ĉefe kiel prizorganto de la Universalaj Kongresoj, sed li okupiĝis ankaŭ pri pluraj aliaj laboroj, kiel kutime okazas en la Oficejo. Li estas unu el la redaktoroj de *Kontakto* kaj regula kunlaboranto de ĉi tiu revuo, por kiu li dum pluraj jaroj prizorgis i.a. la bibliografian rubrikon "Laste aperis. . .".

Oficiala Informilo

N-ro 549

ADRESŜANĜO CORSETTI

D-ro Renato Corsetti, vicprezidanto kaj estrarano de UEA pri planado kaj landa agado, havas novajn adreson kaj telefonnumeron. Vidu en la estrara adresaro sur la dua kovrila paĝo.

ADRESŜANĜO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Kiel ni jam aludis en nia numero de oktobro pasintjare, pluraj movadaj organizaĵoj en la norvega ĉefurbo aĉetis komunan sidejon. Sekve, Norvega Esperantista Ligo havas nun jenan adreson: NEL, Olaf Schous vei 18, Oslo 5. Ankaŭ la telefono estas nova: (02) 35 08 94. La sama adreso validas ankaŭ por Eldonejo Esperanto, *Norvega esperantisto* kaj Klubo Esperantista en Oslo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Aŭstralio: S. Kanački.

SOCIETO ZAMENHOF 1981

JUG: 205 Neven Kovačić. SVED: 206 Åke Ericson.

Antaŭdankon por la frua pago de via kotizo por la jaro 1982

DONACOJ 1981 Gld. (ĝis la 30a de novembro; listo de aliaj donacoj en 1981 aperos en la februara numero)

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo s-ino B. Knight 465,88. Sumo ĉi-jara 16 025,68.

FONDAĴO CED: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Sumo ĉi-jara 141,20.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Italio: Vicenza Esp.-Grupo 20,00. Sumo ĉi-jara 5 447,73.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: S. De Weerd 37,58. FR Germanio: H. Schindler 68,04. Sumo ĉi-jara 4 244,65.

FONDAĴO ENCIKLOPEDIO: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 200,00. Sumo ĉi-jara 633,20.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Belgio: E.L.M. Wensing 1 958,69. FR Germanio: A. Garcia 39,51. Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Sumo ĉi-jara 3 337,35.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Finnlando: Kalervo Kivelä 24,60. Sumo ĉi-jara 224,60.

FONDAĴO TEJO: Nederlando: O. Hoekstra 250,00; H.H. Weulen Kranenberg 75,00. Sumo ĉi-jara 1 056,74.

FONDAĴO KER: FR Germanio: L.F. von Wunsch-Rolshoven 872,31.

ĜENERALA KASO: FR Germanio: E. Herlitze 21,89. Kanado: W.D.B. Hackett 14,11. Nederlando: H. de Geus 24,60; O. Hoekstra 250,00; G. Waterbolk 24,60; H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Svislando: F. Cool-Côté 24,60. Diversaj malgrandaj 9,25. Sumo ĉi-jara 11 893,12.

NOV-JORKA OFICEJO: **Patronoj** (minimume $100): Aŭstralio: Owen Lornegan. Finnlando: Ahto Linja. FR Germanio: Bertil Englund. **Subtenantoj** (min. $25): Aŭstralio: Esperanto-Societo Sydney. Britio: Ges-roj Sly. Japanio: Iwao Katô. Usono: James F. Cool. **Amikoj** (min. $10): Aŭstralio: O.H. Behnken; S. Burkitt; M. Chaldecott; T. Elliott; I. Slavoff. FR Germanio: Hans Siffrin. Svedio: Signild Johansson; Tore Johansson. Usono: Joan Feingold; Jules Germain; Rouvan Y. Lubow; Charles G. Marr; Scott S. Smith. Sumo ĉi-jara: 34 121,77 gld.

PATRONOJ DE TEJO: 50 Josef Hartl, Aŭstrio. 51 O. Eklund, Svedio.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Sumo ĉi-jara 250,00.

Al ĉiuj tre koran dankon! **UEA**



Volas korespondi kun alilandaj esperantistoj 23-jara f-ino Saideh Chizari, Shemiran Chizar, Hashemi Alley 15, Tehran 19379, Irano.

Senpage vi ricevas ekzempleron de *La migranto*, riĉe ilustrita revuo pri turismo, naturbelaĵoj, ekologio, naturprotektado. Skribu al: Liesel Nagel, Moosgrund 8, D-7800 Freiburg, FR Germanio.

Pri internacia pacdevigo volas korespondi John C. Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix, Arizona 85018, Usono.

Malfermu ŝparkonton! Jam pli ol 110 000 guldenojn deponis membroj de UEA en fiksdatajn ŝparkontojn ĉe la Centra Oficejo. Ili gajnas renton de 6% jare kaj samtempe helpas la Asocion. Petu pliajn informojn de la C.O.

17-jara irana lernanto volas korespondi: s-ro Bagher Mahmoodi, kooche-e Aloochoo, pelak-e 22, Khyaban-e Bajak, Qom, Irano.

Ni bezonegas abundan ekspozicimaterialon. Helpe sendu librojn, gazetojn, leterojn kaj ĉiajn esperantaĵojn. Anticipan dankon! Studenta Esperanto-Centro, Caixa Postal 57, BR-74000 Goiânia (GO), Brazilo.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas **esperante** kaj **germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtĝirkonto Hamburg 150 58-209.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj ne respondecas la redakcio. Ripeta aperigo de la sama anonceto ne rajtigas je rabato (kiun ĝuas la grandaj anoncoj).

Disko/kasedo *Tra l' mondo* de Olivier Tzaut kaj nova disko/kasedo *Karnavaleto* aĉeteblaj ĉe Olivier Tzaut, Arêtes 7, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Oni mendu skribante sur la ĉekkuponon la deziritan objekton. Prezo (sendokostoj inkluzivitaj): disko: 24 sv.fr.; kasedo: 20 sv.fr. Vendas ankaŭ UEA.

Tutmonde, pri ĉiuj temoj, kun virinoj volas korespondi 44-jara: s-ro M. Ban, Casella Postale 3704, I-34011 Aurisina (TS), Italio.

39-jara itala oficisto, ankoraŭ fraŭlo, deziras korespondi kun samideaninoj. Skribu al s-ro Girolamo Lucchetta, I-31050 Monastier (TV), Italio.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!



Lernanto deziras korespondi: s-ro Javed Hussain Baloch, M.C.B., Katchery Rd., Sargodha, Pakistano.

Brazilaj filatelaĵoj nun estas aĉeteblaj

La bela brazila poŝtmarko, eldonita omaĝe al la 66a Universala Kongreso, estas havebla ĉe la Libroservo de UEA en kompletoj de jena konsisto:

A. Unuataga koverto plus Edital-folio 5,40 gld.
B. Kiel A, plus bloko de 4 neuzitaj pm 7,50 gld.
C. Kiel B, plus paro aŭ kvaropo de uzitaj poŝtmarkoj 9,00 gld.

Se vi mendas nur la filatelaĵojn, pensu pri la minimumaj sendokostoj de 5,00 gld. Nederlandaj klientoj bv. aldoni 4 procentojn da imposto. Je mendo de almenaŭ tri samspecaj kompletoj vi ĝuas la kutiman trionan rabaton.

"Niaj grup-kunvenoj estas tedaj, tial mi ne plu vizitas ilin." Certe vi konas tiajn kaj similajn plendojn. Nu, vi ja ne tuj devas fondi — kiel oni faris en japana urbo Nagojo — monatan rondon AMIKARO DE MONATO, sed ankaŭ vi povas profiti el la riĉa materialo, kiun enhavas MONATO, por vigligi viajn kunvenojn. Neniam mankos temoj por priparoli, diskuti, aktiviĝi.

Se ankaŭ vi volas savi viajn grup-kunvenojn, petu varb-materialon ĉe: Eldonejo TK/Stafeto, Miksebaan 65 A, B-3130 Brasschaat, Belgio.

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 960 bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (64,00 gld.; por Nederlando 66,56 gld.). Petu provekzempleron kontraŭ du int. respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

Plena analiza gramatiko de Esperanto

kompletigas la kvaropon

Kiam en 1970 aperis *Plena ilustrita vortaro* (135,60 gld.), ĝi estis la sola baza verko havebla en la movada libromerkato. En 1974 aldoniĝis al ĝi *Esperanto en perspektivo* (84,00 gld.). Antaŭ du jaroj, Hungara Esperanto-Asocio represis la malnovan *Enciklopedio de Esperanto* (45,00 gld.), kaj — fine — per la eldono de *Plena analiza gramatiko de Esperanto* UEA kompletigis tiun eminentan kvaropon de la bazaj kaj elĉerpaj konsultolibroj pri (pli-malpli) ĉiuj aspektoj de la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado.



Laŭ la ĝisnuna vendoritmo de *Plena analiza gramatiko*, eblas prognozi, ke ĝuste ĝi, la lasta aliĝinto al la kvaropo, plej baldaŭ forlasos la libromerkaton, ĉar jam nun, unu jaron post la apero, restas malmulte pli ol triono de la 3000-ekzemplera eldonkvanto. Rapidu do mendi!

Plena analiza gramatiko de Esperanto (1935), K. Kalocsay (1891-1976) kaj G. Waringhien (1901-). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1980 (4a tralaborita eldono). 599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 022 0. Prezo: 48,00 (por Nederlando 49,92) gld., plus sendokostoj. Triona rabato ekde 3-ekzemplera mendo.

John Wells:
Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Klara kaj klera scienca analizo, laŭ la moderna lingvistiko, de la Internacia Lingvo. Nemalhavebla por la serioza esperantisto! Enkonduko • Fonetiko • Morfologio • Sintakso • Leksiko kaj semantiko • Fonetikaj simboloj • Bibliografio • Indekso de terminoj. Prezo: 12,00 guldenoj.

Tutmonda Esperantista Adresaro 1981/1982

Enhavante ĉ. 2700 adresojn (kun indikoj pri naskiĝjaro, profesio, hobioj, grado de E-scio, deziro korespondi, preteco gastigi) el ĉ. 60 landoj, ĝi estas **la plej ampleksa esperantista adresaro**. Tuj mendu ĝin ĉe via kutima libroservo aŭ ĉe Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio. Prezo tie: 6,60 gmk. + sendokostoj.

Mendu nun viajn UNICEF-salutkartojn por la Semajno de Internacia Amikeco (21a – 27a de febr. 1982). Dek kartoj kun kovertoj (minimuma mendokvanto): 11,00 guldenoj ĉe la Libro-Servo de UEA. (Sen rabato por revendistoj.)

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 62 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla Kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera Tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 16,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (33,00 guldenoj; por Nederlando 34,32 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, Madrid 16, Hispanujo

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska